

# EL POPOLA ĈINIO

中國報道

2 1983





## DATONG — FAMA HISTORIA KULTURA URBO DE ĈINIO

Fotoj de WANG SHOULIANG



Larĝa strato de la urbo



Prediko-aŭskultanta budhostatuo en  
la templo Huayan

La urbo Datong situas en la norda parto de Shanxi-provinco de Ĉinio. En la antikveco ĝi limtuŝis norde nacimalplimultan regionon. Jam antaŭ 1 500 jaroj la feŭda Norda Wei-dinastio prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. Post la 11-a jarcento ĝi servis kiel vicĉefurbo de la dinastioj Liao kaj Jin. La dinastioj Ming kaj Qing starigis tie subprovincan registaron.

En la regiono Datong konserviĝas abundaj kulturaj restaĵoj de diversaj naciecoj. Inter ili estas monde fama ŝtonkavernaro Yungang, la temploj Huayan kaj Shanhua, Naŭdraka Ekranmuro, Tambura Turo kaj aliaj. Tiuj antikvaj kulturaj restaĵoj altiras al si ĉiam pli multajn enlandajn kaj eksterlandajn turistojn. (Bv. legi la artikolon "Datong — Antikva Urbo de Ĉinio" en tiu ĉi numero.)






La Naŭdraka Ekranmuro

La Tambura Turo en la urbo








La majesta statuo de Śakjamunio meze en la 20-a kaverno estas reprezenta verko de la kavernaro.





Reliefoj pri la biografio de Sakjamunio surmure en la malantaŭa ĉambro de la 6-a kaverno



Delikate skulptitaj ornamajoj sur la orienta por-do en la antaŭa ĉambro de la 10-a kaverno



La ĉefa budhostatuo sur la norda muro de la 18-a kaverno



Koloraj skulptitaj bodisatvaj statuoj de Liao-dinastio en la templo Huayan





Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN) P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

## SUR LA KOVRILO:

Knabino en Brodado (novjara pentraĵo)

de ZHANG XIAOFEI

La novjara pentraĵo estas belartajo ŝatata de la ĉina popolo. En la Printempa Festo la ĉinoj ŝatas ornamaj ĉambroj per novjaraj pentraĵoj, kiuj intensigas la etoson de la festo. La pentraĵo prezentas, ke kampara knabino faras brodaĵon por edziniĝo en bela medio.

## SUR LA DORSKOVRILO:

Longvivulo (bambua plektaĵo)

La metiartaĵo kun tola internaĵo estas plektita el maldikaj bambuaj lamenoj. Ĝi ricevis la unuaklasan premion de "Cent Floroj" por ĉinaj metiartaĵoj.

Longvivulo estas arta figuro ŝatata de la ĉina popolo, kaj la persiko en lia mano simbolas longan vivon kaj feliĉon.

## KOLORAJ SERIOJ:

Datong — fama historia kultura urbo de Ĉinio

Pejzaĝo de Conghua

Fotoj faritaj de Esp-istoj

Nova fizionomio de la ebenaĵo Xuhuai

Antikvaj sutroj — "Zhao Cheng Jin Zang"

## NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ:

Agrabla loko por ĉinaj geknaboj

Amikeco de Jugoslava Pentristo

Hungaraj muzikistoj en Ĉinio

## Enhavo

Pri la nova konstitucio de Ĉinio . . . . .	2
Struktura reformo de la ĉina mezgrada eduko . . . . .	5
Profesiaj superaj mezlernejoj en Pekino . . . . .	8
MIA VIVO: Geknaboj fariĝu talentuloj . . . . .	12
Amikeca ponto inter la redakcio kaj legantoj . . . . .	14
SUR NIA LIBROBRETO: Ŝi amis ne nur sian patrimon . . . . .	16
POR KOMENCANTOJ: Forto de la semo . . . . .	34
ESP-NOVAĴOJ: . . . . .	21
Kulturado de virga tero en Ĉinio . . . . .	23
Elektro el sub la tero . . . . .	28
Agrabla loko por geknaboj . . . . .	19
La unuaj virinaj piedpilkaj teamoj en Ĉinio . . . . .	30
Nekonataj Helpemuloj . . . . .	32
Du noveletoj: Printempa nokto Adiaŭo . . . . .	35
Ĉina aligato . . . . .	38
KURANTAJ AFEROJ . . . . .	11
Vojaĝo laŭ la Granda Kanalo (2): Sur la ebenaĵo Xuhuai . . . . .	50
VIDINDAJ LOKOJ: La termfontaro Conghua . . . . .	26
5 000 JAROJ DE ĈINIO: Brilaj atingoj de la Orienta Han-dinastio . . . . .	40
HISTORIAJ URBOJ: Datong — antikva urbo de Ĉinio . . . . .	46
HISTORIAJ OBJEKTOJ: Reviviĝo de antikvaj sutroj . . . . .	48
ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Tradiciaj festoj de Ĉinio (2) . . . . .	44
Ekonomia kunlaboro inter latinamerikaj landoj . . . . .	43

JARABONTARIFO		Belgio	BF	180.00	Finnlando	FMK	24.00	Italio	Lit	5200	Nederlando	Gld.	12.60	Portugaliao	Esc	400	
Aŭstralio	\$A	5.70	FR Germanio	DM	10.80	Francio	FF	26.00	Japanio	Yen	1400	Nov-Zelando	NZ\$	6.70	Usono	US\$	6.00
Aŭstrio	Sch	80.00	Britio	£	3.00	Hispanio	Pts	600	Jugoslavio	Din.	180	Svisio	SF	10.00	Kanado	Can\$	7.20
Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 2.20 US\$ 4.30																	
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 3.00 US\$ 6.00																	

# Pri la nova konstitucio de Ĉinio

**J**E la 4-a de decembro 1982 la Kvina Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio aprobis novan konstitucion de la Ĉina Popola Respubliko. Antaŭ nelonge ĵurnalisto de la Pekina Ĵurnalo intervjuis kamaradon Zhang Youyu, faman ĉinan juriston kaj vicprezidanton de la Komisiono pri Leĝa Sistemo sub la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio. Jen ilia dialogo:

**Ĵurnalisto:** Per kio karakteriziĝas la nova konstitucio?

**Zhang:** Konstitucio estas fundamenta leĝo de la ŝtato. La nova konstitucio aprobita de la Kvina Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio estis ellaborita laŭ la konkretaj kondiĉoj de Ĉinio kaj havas siajn proprajn trajtojn, kiuj estas kla-

re videblaj kompare kun konstitucioj de aliaj landoj. Ekzemple, nia nova konstitucio kondiĉas, ke la bazo de la ekonomia sistemo de Ĉinio estas socialisma publika posedanteco de produktaj rimedoj, kaj samtempe la individua ekonomio, kiel suplemento de la socialisma publika ekonomio, estas permesata ekzisti por longa tempo. Krome ni praktikas principon de planizita ekonomio, kaj samtempe ni lasas merkaton ludi la suplementan rolon kaj permesas investon de eksterlanda kapitalo en Ĉinio kaj diversformajn ekonomian kaj teknikan kunlaborojn inter ĉinaj kaj eksterlandaj entreprenoj. Jen la trajtoj de la nova konstitucio de Ĉinio.

Ĉinio donas tian permeson, ĉar ĝia ekonomio kaj ĝiaj scien-

co kaj tekniko estas postĝintaj kaj ĝi celas grandigi sian proprajn fortojn kaj disvolvi sian nacian ekonomion per investo de eksterlanda kapitalo kaj importo de eksterlandaj scienco kaj tekniko. Ĉiuj eksterlandaj entreprenoj kaj aliaj ekonomiaj organizoj en Ĉinio devas obei la ĉinajn leĝojn kaj ne damaĝi la interesojn de Ĉinio kaj ĝian nacian dignon.

La nova konstitucio kondiĉas ankaŭ, ke estas necese doni memdecidan rajton al ŝtataj entreprenoj kaj kolektivaj ekonomiaj organizoj. Tamen tiu rajto estas limigita. Ŝtataj entreprenoj havas memdecidan rajton pri funkciigo kaj administrado nur en la limoj difinitaj de leĝo kaj kun kondiĉoj ke ili submetiĝas al unueca gvido de



*Reprezentantoj diskutas pri la nova konstitucio.*





*La kunvenejo de la Kvina Sesio de la Kvina Tutlanda Popola Kongreso*

la ŝtato kaj tute plenumas la ŝtatan planon. Rilate la kolektivajn ekonomiajn unuojn, ili havas memdecidan rajton pri sendependa ekonomia aktivado, kondiĉe ke ili estas volonte direktataj de la ŝtata plano kaj observas la koncernajn leĝojn.

En politika sistemo la popola kongreso de Ĉinio diferencas kaj de la parlamento de okcidentaj landoj kaj de la Supera Soveto de Sovetunio. La nova ĉina konstitucio kondiĉas, ke la konstanta komitato de la popola kongreso havas leĝodonan povon. Ĝi rajtas ellabori kaj revizii ankaŭ ĉiujn aliajn leĝojn escepte de tiuj ellabendaj por la tutlanda popola kongreso, kaj fari partan kompletigon kaj revizion al la leĝoj ellaboritaj de la tutlanda popola kongreso, kiam ĝi ne estas en sesio, kondiĉe ke tio ne kontraŭas al la fundamentaj principoj de la koncernaj leĝoj.

Kial necesas tia kondiĉo? Ĉar Ĉinio havas vastan teritorion kaj grandan loĝantaron, tial estas nekonvena tutlanda popola kongreso kun nur malmultaj reprezentantoj. Nun la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio

nombras pli ol 3 400 reprezentantojn. Sed estas malfacile, ke tiom da homoj kunvenu multajn fojojn ĉiujare, kaj tamen nia lando troviĝas en la nova historia periodo kaj bezonas diversajn leĝojn, precipe la ekonomiajn, sekve de tio estiĝas kontraŭdiro. Kiam la konstanta komitato de la popola kongreso ekposedas leĝodonan povon, la kontraŭdiro povas esti solvita. La konstanta komitato de la popola kongreso nombras nur malmultajn membrojn kaj povas konstante funkcii por plenumi sian devon.

Krome, la nova konstitucio plurfoje tuŝas la pozicion kaj rolon de intelektuloj en la ŝtato. Ĝi emfazas, ke same kiel laboristoj kaj kamparanoj, la intelektuloj estas ĉefa forto nemalhavebla por la ŝtato. Tio estas konforma al la nuna stato de Ĉinio kaj tre grava, ĉar sen intelektuloj Ĉinio ne povus fari sian modernan konstruadon kaj ĉiam restus en postĝinteco.

**Jurnalisto:** Kiujn novajn kondiĉojn tiu ĉi konstitucio donas por konformi al la bezono de la socialisma moderna konstruado en la nova historia periodo?

**Zhang:** Unue ni devas iom post iom efektiviĝi la modernigon de industrio, agrikulturo, nacidefendo, scienco kaj tekniko, kaj konstrui Ĉinion en socialisman landon kun altaj civilizacio kaj demokratio, kion klare traktas la konstitucio. Iuj artikoloj en la ĉapitro "Ĝeneralaj Principoj" kondiĉas la posedantecon de produktaj rimedoj, la ekonomian planadon, la sistemon de ekonomia administrado kaj tiel plu. Tiuj kondiĉoj estas favoraj al la ekonomia disvolviĝo de Ĉinio. Antaŭe ni havis rigidan administradon nekonforman al la disvolviĝo de produktaj fortoj; ni faras distribuon surbaze de absoluta egalismo, kio ne povis levi laborentuziasmon de salajruloj. Nun ni devas ŝanĝi tian staton.

La socialisma konstruado en materia kaj spirita civilizacio bezonas garantion kaj subtenon de la socialisma demokratio. Por bone plenumi ekonomian laboron, la centran taskon de la socialisma moderna konstruado, ni devas doni atenton ĉefe al praktikado de demokratia administrado en la ŝtataj entreprenoj kaj kolektivaj ekonomiaj unuoj.

La nova konstitucio kondiĉas, ke la ŝtataj entreprenoj praktikas demokratian administradon per kongreso de la laboristoj kaj oficistoj kaj aliaj rimedoj laŭ la leĝo kaj, ke la laboruloj de kolektivaj ekonomiaj unuoj rajtas elekti aŭ eksigi sian administrantaron kaj decidi pri gravaj demandoj koncernantaj funkciigadon kaj administradon. En politiko la popolo ne nur efektivas sian regadon per popola kongreso, sed ankaŭ, laŭ la leĝo, administras ŝtatajn aferojn, ekonomian, kulturen kaj sociajn aferojn. En socia vivo la popolo praktikas aŭtonomecon per loĝantara kaj vilaĝana komitatoj. Ĉio ĉi montras, ke Ĉinio havas vastan demokration. Oni devas

strikte ligi disvolvon de socialisma demokratio kun plifortigo de socialisma leĝa sistemo por sistemigi kaj legitimi demokration. Pri tio ĉi klare kondiĉas la kvina artikolo de la konstitucio: ĉiuj ŝtataj institucioj kaj armitaj fortoj, ĉiuj politikaj partioj, publikaj organizoj, entreprenoj kaj establaĵoj devas obei la konstitucion kaj la leĝon. Tio signifas, ke ajnaj individuoj kaj organizoj, inkluzive la Komunista Partio de Ĉinio, ne devas agi ekster la limoj de la konstitucio kaj la leĝo.

**Jurnalisto:** Kiujn novajn rajtojn la civitanoj havas?

**Zhang:** Multajn. Ekzemple, la nova konstitucio restarigis la

enhavon kondiĉitan en la konstitucio de 1954, ke "ĉiuj civitanoj de la Ĉina Popola Respubliko estas egalrajtaj antaŭ la leĝo". La antaŭaj konstitucioj kondiĉis, ke la persona libereco de civitanoj estas neatencebla. Pri tiu ĉi punkto la nova konstitucio donas detalojn, kiel ekzemple, malpermeso de kontraŭleĝaj aresto kaj traserĉo. En la nuna konstitucio estas nova artikolo pri emerita sistemo, kiu mankis al la antaŭaj konstitucioj. Por ĉerpi instruon el la kultura revolucio oni aparte aldonis la artikolon, ke la persona digno de civitanoj estas neatencebla. Ĉiuj ĉi aldonoj celas plivastigi demokration. Ĉar nia lando estas socialisma, nia popolo devas ĝui vastan demokration kaj grandan liberecon.

Kompreneble, kiam civitano ĝuas sian liberecon kaj uzas siajn rajtojn, li absolute ne devas damaĝi la ŝtatajn, sociajn kaj kolektivajn interesojn, nek la leĝajn liberecon kaj rajtojn de aliaj civitanoj.

#### *Balotado pri la konstitucio*





# Struktura reformo de la ĉina mezgrada eduko



La aŭtoro

**R**EFORMO de la strukturo de la mezgrada eduko estas granda ŝanĝiĝo de la ĉina eduko en la lastaj jaroj. La reformo ĉefe estas reguligi la proporciojn inter la ordinaraĵ superaj mezlernejoj kaj diversaj profesiaj kaj teknikaj lernejoj por favorigi la lastajn.

Komence de la kvindekaj jaroj, Ĉinio starigis nombron da mezgradaj fakaj kaj teknikaj lernejoj por elkulturi mezgradajn teknikistojn kaj lertajn laboristojn. Dum la lastaj jaroj de la kvindekaj jaroj kaj la unuaj kvin jaroj de la sesa jardeko, disvolviĝis ankaŭ la agronomiaj mezlernejoj, profesiaj lernejoj kaj duonlaboraj kaj duonstudaj lernejoj. Je la fino de 1956, la totala nombro de la lernantoj, kiuj lernis en la profesiaj kaj teknikaj lernejoj, inkluzive de la mezgradaj fakaj lernejoj, teknikaj lernejoj, agronomiaj mezlernejoj kaj profesiaj lernejoj, konsistigis 52.1% de tiu de la lernantoj de la supera mezgrada eduko. La proporcio ĝenerale respondis al la bezono de la tiamaj abituroj, iuj el kiuj volis labori kaj aliaj lerni en altlernejo. La dekjara tumulto de la kultura revolucio preskaŭ detruis la sis-

temon de profesia kaj teknika eduko. En 1976 la nombro de la lernantoj ĝuantaj tian edukon konsistigis nur 1.16% de tiu de la lernantoj de la supera mezgrada eduko. La blinda multigo de ordinaraĵ superaj mezlernejoj preskaŭ faris la mezgradan edukon unusola strukturo.

Dum la lastaj jaroj la altlerneja eduko disvolviĝis relative rapide, tamen ĉiujare el ĉirkaŭ 4 000 000 diplomitoj el la superaj mezlernejoj nur 300 000 povis viziti altlernejon. Kaj pli ol 90% de ili devis serĉi laboron. Kun senĉesa disvolviĝo de la nacia ekonomio kaj scienco kaj tekniko la socio bezonas grandan nombron da mezgradaj teknikistoj kaj lertaj laboristoj. La edukasistemo, la lernoprogramo kaj la instrumaterialo de la ordinaraĵ superaj mezlernejoj nur kontentigas la bezonon de lernantoj viziti altlernejon. Multaj diplomitoj el la superaj mezlernejoj, kiuj ne ricevis profesion trejnadon, devis esti rekulturataj, post kiam ili eklaboris. Evidente, la strukturo de mezgrada eduko ne estas konforma al la bezono de la socialisma konstruado. Pro tio la ĉina registaro decidis ĝin reformi.

La ĉefa metodo por la reformado estas bridi la disvolviĝon de ordinaraĵ superaj mezlernejoj; aldoni teknikajn kursojn en tiuj lernejoj; turni parton de tiuj lernejoj en profesiajn lernejojn kaj agronomiajn mezlernejojn aŭ aldoni diversajn profesiajn kaj agronomiajn kursojn al la altaj klasoj de ordinaraĵ mezlernejoj; mobilizi diversajn entreprenojn por fondi profesiajn lernejojn aŭ trejnajn kursojn; kaj daŭre bone funkciigi la mezgradajn fakajn kaj teknikajn lernejojn. Per tio oni energie disvolvas profesion kaj teknikan edukon, por ke plejparto de la lernantoj povu ricevi tiuflankan edukon.

Dum reformo de la strukturo de mezgrada eduko kaj disvolvo de profesia eduko Ĉinio aplikis plurajn formojn por funkciigi lernejojn kaj servigi ilin al loka produktado kaj socia vivo. La nunaj profesiaj kaj teknikaj lernejoj aŭ profesiaj kursoj havas ĉefe jenajn formojn:

1. Lernejoj kune funkciigitaj de edukaj departementoj kaj koncernaj entreprenoj. Estas multaj tiaj lernejoj en grandaj kaj mezgrandaj urboj. Iliaj ler-



*Lernantinoj de la tajlora kurso funkciigata de la mezlernejo Shabanzhuang de Pekino senpage tajlas por najbaraj loĝantoj.*

noprogramo kaj plano por akcepti novajn lernantojn estas difinitaj laŭ la bezono de la koncernaj entreprenoj. La instruistojn, ekipaĵojn, monrimedojn necesajn por la klerigaj kursoj prizorgas la edukaj departementoj, dum tiujn necesajn por la fakaj kursoj prizorgas la koncernaj entreprenoj.

2. Profesiaj lernejoj aŭ agromoniaj mezlernejoj funkciigataj de fabrikoj, minejoj, popolaj komunumoj aŭ produktaj brigadoj mem. Iliaj lernoprogramo kaj plano por akcepti novajn lernantojn, instruistoj, ekipaĵoj, monrimedoj kaj loko por praktikado devas esti liverataj de tiuj organizaĵoj, kiuj fondis tian lernejon. Ili lernoprogramo strikte ligiĝas kun ilia laborbezono, pro kio oni povas elkulturi por si lertajn teknikistojn.

3. Profesiaj lernejoj aŭ profesiaj mezlernejoj kaj agromoniaj mezlernejoj fonditaj de

edukaj departementoj surbaze de iuj ordinaraj superaj mezlernejoj, laŭ la bezono de la socio. La fakaj scioj instruataj en tiaj lernejoj estas ĝenerale aplikeblaj.

4. Centro por profesia kaj teknika eduko establita en regiono. Ĝia ĉefa tasko estas liveri lokojn de instruado kaj praktikado por la kurso de profesia eduko en ordinaraj mezlernejoj; trejni gejunulojn senlaborajn por mallonga tempo; kaj doni profesion edukon al la lernantoj de profesiaj kursoj de tiu centro. Nuntempe la urbo Fuxin de la provinco Liaoning havas tian edukan centron, kiu donas bonan profesion edukon.

Ekde 1978 Ĉinio komencis reformi la strukturon de mezgrada eduko. En 1980 Ĉinio havas 3 314 profesiajn mezlernejojn kaj agromoniajn mezlernejojn, kun 450 000 lernantoj. La nombro de la lernantoj de la mezgradaj fakaj lernejoj atingis 1 240 000,

kaj tiu de la lernantoj de la teknikaj lernejoj fonditaj de lokaj entreprenoj atingis 680 000. En 1980 la Ŝtata Konsilantaro aprobis la «Raporton pri Struktura Reformo de Mezgrada Eduko» faritan de la Eduka Ministerio kaj la Ŝtata Ĝenerala Laboragen-tejo, kio pli akcelis la aferon. Dum la lastaj jaroj la reformado jam rikoltis efikon. En 1981 rimarkinde reduktiĝis la nombro de la lernantoj en la ordinaraj superaj mezlernejoj, kaj la nombro de la lernantoj de diversaj profesiaj kaj teknikaj lernejoj konsistigis 23.8% de la totala nombro de la lernantoj, kiuj ricevas superan mezgradan edukon.

Nun estas tre multaj fakoj en la ĉinaj profesiaj kaj teknikaj lernejoj. Ekzemple, tiaj lernejoj nove fonditaj en Pekino havas 73 fakojn. En la urboj estas lernejoj kun la fakoj de elektrono, malpeza industrio, tekstila industrio, konstrumaterialoj, librotenado, turismo, komerco, kuirarto, servado, riparado, presarto, kudrado, manĝaj-preparado kaj pedagogio, kaj en la kamparo lernejoj kun la fakoj de agronomio, forstumado kaj fruktarba kulturado, brutobredado, akvoprodukta bredado kaj meĥaniko.

La ŝtato ne donas laboron al ĉiuj diplomitoj el la profesiaj lernejoj kaj agromoniaj mezlernejoj. La ŝtataj entreprenoj enoficigas la bonajn el ili, aŭ la loĝkvartalaj komitatoj, popolaj komunumoj kaj produktaj brigadoj partoprenigas iujn en kolektiva laboro. Estas ankaŭ alia vojo por serĉi vivrimedojn (ekz. riparado, kudrado kaj fiŝbredado) aŭ partopreni en ekzameno por viziti altlernejon.

La profesiaj kaj teknikaj lernejoj estas bonvenaj al lernan-



toj, iliaj gepatroj, la socio kaj koncernaj entreprenoj. Post la fondo de tiaj lernejoj, la lernantoj montris grandan entuziasmon en sia lernado por akiri fakajn sciojn kaj teknikon. Ili havas eblecon ricevi laboron, kio povas trankviligi iliajn gepatrojn. La entreprenoj trejnigas la elektitajn diplomitojn antaŭ ilia enoficiĝo por havigi al ili lertecon. Tiaj lernantoj havas certajn fakajn sciojn kaj teknikon. Ili laboras trankvile kaj serioze. La agronomiaj mezlernejoj fonditaj en la kamparo kombinas instruadon, kamplaboron kaj sciencajn eksperimentadon. Post sia diplomitiĝo la lernantoj revenas al sia vilaĝo por ĝin konstrui. Ili fariĝas elito en la produktado kaj estas bonvenaj al la kamparanoj.

---

\* La aŭtoro estas vicministro de la Eduka Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko.



Lernantoj de tekultura kurso de Zhejiang en te-ĝardeno

Gastronomia leciono de iu profesia kurso en la strato Shahe de Kantono



# PROFESIAJ SUPERAJ MEZLERNEJOJ EN PEKINO

## ILIA NASKIĜO LAŬ LA BEZONO DE SOCIO

En la lastaj kelkaj jaroj, la eduka kaj labora departementoj de Pekino fondis multajn profesiajn kaj teknikajn lernejojn. Krom tiuj lernejoj, subtenate de la urba registaro, profesiajn kursojn fondis ankaŭ iuj mezlernejoj kaj institucioj, kiuj volas havigi al si taŭgajn oficistojn aŭ laborantojn. Tio estas nova formo de la mezgrada profesia

eduko de Ĉinio, estiĝinta en la disvolviĝo. La kursoj akceptis diplomitojn el la malsuperaj mezlernejoj kaj kulturaj ilin en talentulojn kun koncernaj teknikaj scioj dum 2 aŭ 3 jaroj antaŭ eklaboro. Tiuj institucioj elektos la eminentajn diplomitojn kiel siajn laborantojn kaj samtempe la diplomitoj povas mem serĉi laborpostenon kaj rajtas pasigi la eniran ekzamenon al alta lernejo. Pro tio la profesiaj kursoj estas bonvenaj

*Lernantino de la turisma kurso de la mezlernejo  
Xinzhongjie praktikas en la hotelo Jianguo.*



al la lernantoj kaj iliaj gepatroj. Tial la diplomitoj de malsupera mezlernejo aktive sin anoncis por ekzameno al tiaj kursoj.

La jenaj faktoj konfirmis, ke la profesia eduko en Pekino naskiĝis laŭ la bezono de la socio. Statistiko montras, ke en la fino de 1965, la nombro de la lernantoj en la diversaj mezgradaj profesiaj kaj teknikaj lernejoj de la tuta urbo konsistigis 48.1% de la totala nombro de la lernantoj en ĉiuj superaj mezlernejoj. La granda ĥaoso kaŭzita de la "kultura revolucio" serioze damaĝis la mezgradan profesion kaj teknikan edukon. En 1976, la lernantoj de tiaj lernejoj konsistigis nur 3.8% de la totala nombro de la lernantoj en ĉiuj superaj mezlernejoj. Tiam funkciis preskaŭ sole la ordinariaj superaj mezlernejoj. Plejparto de diplomitoj de la malsuperaj mezlernejoj povis daŭre lerni nur en la supera mezlernejo post la enira ekzameno, kaj la diplomitoj de la lasta povis nur partopreni en la enira ekzameno al la alta lernejo. En nia lando la altaj lernejoj povas akcepti nur malmultajn abiturientojn. Pro manko de diversaj profesiaj kaj teknikaj lernejoj, la mezlernejoj povis nur konkure strebi por eniri la altan lernejon. Oni priskribis tian fenomenon kvazaŭ miloj da homoj trapasus soltrunkan ponton.

Kun disvolviĝo de la moderna konstruado, la ŝtato bezonas grandan kvanton da laborantoj kun kompare alta kultura nivelo kaj faka scio. Kvankam la edukaj departementoj restarigis kaj fondis nombron da teknikaj mezlernejoj en la lastaj jaroj, tamen la skalo de tiaj lernejoj kaj la nombro de iliaj diplomitoj kaj teknikaj faktoj ne



povas kontentigi bezonon de la socio. Pro manko de fakaj scioj la novicoj varbitaj inter mezlernejoj diplomitoj devas esti ree trejnataj per metiista metodo dum mallonga tempo. Jen estas granda distanco inter la bezono de nia moderniga konstruado kaj la malmoderna kulturado de laborantoj.

La profesiaj kursoj de la supera mezlernejo de Pekino naskiĝis aŭtune de 1980, kaj nun ilia nombro atingis 432 kun 12 912 kursanoj en 87 lernejoj, kiuj enhavas 73 fakojn, inkluzive de turismo, financo, komerco, servado, pedagogio, ŝpinteksado kaj presado. En 1982 la akceptitaj lernantoj de tiaj kursoj konsistigis 12% de tiuj de ĉiuj superaj mezlernejoj, kaj la nombro de la kursanoj kaj la lernantoj de la teknikaj mezlernejoj ambaŭ konsistigis 23.4% de tiu de ĉiuj superaj mezlernejoj.

## EN PRAKTIKADO

Antaŭ la servotablo sur la 8-a etaĝo de la Pekina Hotelo kelkaj knaboj kun insigno de lernanta servisto sur brusto plenumis sian servon al fremdlandaj gastoj. La 16-jara servisto Xiao Cheng eniris iun ĉambron kun vestoj lavitaj kaj gladitaj sur la manoj kaj ĝentile diris al la gasto: "Jen viaj vestoj, s-ro, bonvolu kontroli!" Li daŭrigis: "Ĉu vi volas rigardi televidon? Ĉu vi volas ĝui muzikon? Mi estas preta al via dispono." La gasto estis tre kontenta pri la entuziasma servado de Xiao Cheng kaj volis doni al li trinkmonon kaj donaceton. Sed Xiao Cheng rifuzis, dirante: "Ni ĉinaj servistoj ne akceptas trinkmonon kaj la servado al vi estas nia devo."



*Lernantinoj de la turisma kurso en la 158-a Mezlernejo servas en butiko de la Pekina Hotelo.*

En la koridoro Xiao Ren portis pakajon por iu Hongkong-a komercisto, kiu estas baldaŭ forlasonta la hotelon por veturi al aerodromo. La gasto dankis al li: "Mi loĝis preskaŭ en ĉiu etaĝo de via hotelo sed en la oka etaĝo unufoje. Vi laboras tre bone! Mi esperas ke vi estos varbita de la Pekina Hotelo, post kiam vi finos la kurson."

Tiuj praktikantoj estas du-klasaj lernantoj de la turisma kurso kune funkciigita de la 158-a Mezlernejo kaj la Pekina Hotelo. En la lastaj julio kaj aŭgusto ili praktikis kiel servistoj en kelkaj grandaj hoteloj de Pekino, kaj estis laŭdataj pro sia modesteco, lernemo, diligenco kaj fervoro.

La turisma kurso fondiĝis en septembro de 1980. Nun tiu 3-lernejara kurso havas tri klasojn kun 9 grupoj. Ĉiujare ĝi akceptas 120 lernantojn. Ĝiaj elspe-

zoj por instruado kaj administrado estas kune pagitaj de la lernejo kaj la hotelo. Ĉiujare la hotelo asignas 40 juanojn al la lernejo kontraŭ elspezo de ĉiu kursano.

La studobjektoj konsistas el du partoj. La unua parto estas la ĉina lingvo, matematiko, historio, geografio, fremda lingvo kaj sporto, kiujn instruas instruistoj de la lernejo mem. La dua parto enhavas kelneran servadon, kuirarton, panopreparadon, manĝajan higienon, fremdlingvan interpretadon, turismon, fremdajn valutojn, metiarton k. a., kiujn instruas altlernejaj instruistoj aŭ veteranaj servistoj de la hotelo.

Krome, la lernejo ankaŭ donas profesion moralan edukon al lernantoj. Dank' al la lernado, praktikado, vizitado kaj aliaj aktivadoj, la lernejo

konigas al la lernantoj gravecon de ilia metio kaj instruas al ili la profesian moralon.

La profesia morala eduko atingis difinitan sukceson. Post siaj studado kaj praktikado, Ren Baodong, lernanto de la 2-a klaso, bone komprenis, ke estas erare malestimĵi servan laboron. Ankaŭ tiu fako estas aparta branĉo de scienco. La Pekina Hotelo servas kiel montrofeneŝtro de nia lando. La tieaj laborantoj ne nur servas al fremdlandaj gastoj en vivo, sed ankaŭ helpas ilin kompreni kaj koni Ĉinion.

Por ke la lernantoj pli bone spertu la turistan vivon, la lernejo organizis ilin vojaĝi al Nankino, Ŝanhajo, Suzhou kaj Hangzhou. En la vojaĝo multaj lernantoj, kiuj longe vivis en Pekino, persone travivis la malfacilojn renkonteblajn por la turistoj. Iu diris: "En hejmo

oni ne povas antaŭvidi malfacilojn en vojaĝo!" Tio plie kuraĝigis la lernantojn konscie studi kaj bone servi.

La gvidantoj de la hotelo estis kontentaj pri la laboro de la lernantoj. Ili opinias, ke la lernantoj superas tiujn ne trejnitaĵn per fakaj scioj, disciplinobservemo kaj gloramo de kolektivo kaj ĉiel klopodas por honori siajn lernejojn kaj instruistojn per siaj grandaj sukcesoj en la lernado kaj laboro.

### VARBI LA PLEJ BONAJN LERNANTOJN KIEL SERVISTOJN

La kursfondintoj varbas la lernantojn plej bonajn en la moralo, intelekto kaj korpo. Se lernantoj serioze malobservis disciplinon kaj persistas en sia eraro, aŭ estas punitaj pro alia kaŭzo, do la kursfondintoj ilin

ne varbas. Tia metodo ludas gravan rolon por eksciti aktivecon de la lernantoj, ke ili strebas al pli da sukceso en la lernado kaj praktiko.

La Pekina Turisma Administracio kaj la mezlernejo Xinzhongjie kune starigis du-lernojaran superan mezlernejan kurson. Plejparto de ĝiaj 239 diplomitoj estis varbitaj de la grandaj hoteloj en la fino de la lasta jaro, kaj nur 5% el ili ne estis akceptitaj pro malsano aŭ malbona konduto. Inter ili 9 diplomitoj (4 viraj kaj 5 virinaj) de financa kurso plenumis praktikon en la hotelo Jianguo. En la unua monato post sia eklaboro, unu el ili estis honorita kiel unua-klasa servisto, tri kiel dua-klasaj kaj kvin kiel tria-klasaj. En la kvara monato, kvar el ili estis honoritaj kiel unua-klasaj servistoj, kvar kiel dua-klasaj kaj nur unu kiel tria-klasa. La hotelo donis al ili jenajn notojn: ili progresis rapide en la laboro, tutkore plenumis sian servon kaj observis disciplinon. Kompreneble, ili estos bonvenaj al la turismaj servoj.

*Lernantinoj de la librotena kurso de la mezlernejo Xinzhongjie praktikas en la hotelo Jianguo.*







## ĜOJINDAJ SUKCESOJ EN JUN- GADO DE LA FLAVA RIVERO

Ĝojindajn sukcesojn Ĉinio atingis en la pasinta 33-jara jungado de la Flava Rivero.

Observante la principon ekspluati sian lokan superecon, la popolo en la supra baseno de la rivero alprenis jenajn rimedojn por jungi la riveron: konstrui instalaĵojn por forporti sablon per kondukita akvo, planti arbojn, semi herbojn kaj aliajn plantaĵojn. Tiel ili konstruis pli ol 2.66 milionojn da hektaroj da kampoj terasaj, striaj kaj altebenaj, arbarigis kaj herbigis pli ol 2.53 milionojn da hektaroj da kampoj. Dank' al tio multe reduktiĝis granda erozio. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio oni trifoje plifortikigis la digojn kaj plialtigis ilin 6-7 metrojn. Krome oni rekonstruis la danĝerajn partojn de la digoj kaj nove konstruis pli ol 8000 digojn kaj dreninstalaĵojn. Ili, kune kun la akvorezervejoj kaj inund-drenaj konstruaĵoj en la meza kaj malsupra basenoj de la rivero, formis kontraŭinundan sistemon. Dank' al tiu sistemo la popolo 12-foje, en la 33 jaroj, venkis inundojn ĉiu kun sekunda flukvanto de pli ol dekmil kubmetroj. La akvo-riĉfonto de la Flava Rivero nun estas ekspluatata. Ĉe ĝiaj ĉeefluoj kaj branĉoj estis starigitaj sep grandaj kaj mezgrandaj hidroelektrejoj, kiel Liujiaxia, Yanguoxia kaj aliaj, kaj miloj da malgrandaj hidroelektrejoj kaj akvoutiligaj instalaĵoj. La kampoj irigaciaj de la Flava Rivero jam kreskis de 800 000 hektaroj en 1949 ĝis 4 530 000 nun. Hodiaŭ la rivero bone servas al la loĝantoj de ambaŭ bordoj.

## FERVOJO KAJ ŜOSEO TRA TIANSHAN-MONTARO

Jam estas finkonstruitaj la unua altebenaja ŝoseo trans Tianshan-

montaro kaj la Sud-Xinjiang-a Fervojo de Yu-ergou ĝis Hejing.

La Sud-Xinjiang-a Fervojo, 467 kilometrojn longa, startas de la orienta parto de Xinjiang, trapasas Tianshan-montaron kaj finiĝas en la suda parto de la regiono. Survoje estas tri trablovejoj, 29 tuneloj kaj pli ol 450 pontoj.

La asfaltita ŝoseo, 560 kilometrojn longa, trairas tri riverojn kaj tri neĝkovritajn montojn pli ol 3 500 metrojn super la marnivelo. Plejparto de la ŝoseo troviĝas sur la altebenaĵo 1 000-3 500 metrojn super la marnivelo. La ŝoseo trairas tri tunelojn, inter kiuj la plej granda longas je 1 897 metroj. Post la finkonstruiĝo de la ŝoseo la trafikakurso inter la suda kaj norda partoj de Xinjiang reduktiĝis je pli ol mil kilometroj.

## KONKURA AĈETADO DE AGRIKULTURAJ MAŜINOJ EN LA ĈINA KAMPARO

Kun la disvolviĝo de la agrikultura produktado kaj enspeza kresko, en multaj lokoj aperis konkura aĉetado de agrikulturaj maŝinoj fare de kamparanoj. En la unuaj 9 monatoj la enlanda vendvaloro de la maŝinoj atingis 4 190 milionojn da juanoj, je 5.8% pli multe ol tiu en la sama periodo de la lasta jaro.

Plimultiĝis la vendvaloro de la agrikulturaj maŝinoj en kvar kvinoj de la ĉinaj provincoj. Inter ili kreskis je pli ol 20% la vendvaloro de la provincoj Yunnan, Guangdong, Gansu, Guizhou kaj Anhui kaj la Interna Mongolio.

Inter januaro kaj oktobro nia lando vendis 208 500 man-traktorojn, je 63 970 pli multe ol en la sama periodo de la lasta jaro.

En Yutai-gubernio, Shandong-provinco, ĉ. dekmil kamparanaj familioj kelkope aĉetis 1 021 man-traktorojn, 3 718 akvopumpilojn, 1 500 grajnodeŝirajn maŝinojn k.a.

En la lastaj du jaroj la komu-

numo Wangguanji de la gubernio Suqian, Jiangsu-provinco, aĉetis 35 grandajn traktorojn kaj 115 man-traktorojn per la kolektiva akumulo, dank' al kio la plugado de kampoj kaj prilaborado de agrokulturaj kaj flankokupaj produktaĵoj estas jam meĥanizitaj.

## LA LOĜKONDIĈOJ DE LA ĈINAJ INSTRUISTOJ PLIBONIGATAJ

En 1981 Ĉinio altigis salajron al la mez- kaj element-lernejaj instruistoj kaj nun plibonigas iliajn loĝkondiĉojn.

En tio la urbo Changsha atingis kompare grandajn sukcesojn. Lastjare en tiu urbo okazis la tutlanda kunveno por diskuti tiun problemon.

En la urbo Changsha laboras 9 500 mez- kaj element-lernejaj instruistoj, el kiuj kvarono jam transloĝiĝis en novajn domojn. Ĝenerale la loĝdomoj situas en la lernejoj aŭ proksime de ili. La pokapa plankareo de ĉiuj instruistoj kaj iliaj familianoj duobliĝis kompare kun tiu en 1978.

## SUKCESA PROVADO DE ĈINAJ SATELITAJ KOMUNIKO KAJ TELEVID-TRANSENDO

Inter la 15-a de junio kaj la 5-a de oktobro, 1982, Ĉinio unuafoje sukcese faris provadon de enlandaj satelitaj komunikoj kaj televid-transsendo.

Laŭ la difino de la Internacia Satelita Organizaĵo, por uzi ĝian komunikan reton, la partoprenantaj surteraj satelitaj stacioj devas esti provataj de tiu organizaĵo. Ĉi-foje 10 ĉinaj stacioj ricevis la provadon, kaj kvin el ili estis instalitaj per la ekipaĵoj projektitaj kaj produktitaj de Ĉinio mem, kiuj atingis ĉiujn teknikajn normojn de la organizaĵo kaj ekfunkciis sankciite de ĝi. Kaj krome, ankaŭ kvar el la aliaj kvin stacioj instalitaj per importitaj ekipaĵoj estis sankciitaj por uzi la reton.

## *Geknaboj fariĝu talentuloj*

de **JI CHONGHUI**

*La aŭtoro estas 43-jara instruistino de mezlernejo. Ŝi ĝuas altan respekton inter la lernantoj pro sia sindonemo al sia instruado, profunda amo al la geknaboj kaj senlacaj klopodoj por plibonigi sian instruadon.*

**La Red.**

Mi estas ordinara instruistino de mezlernejo. Kulture geknabojn en talentulojn estas mia plej granda deziro.

Kiam mi lernis en mezlernejo, mi tre ŝatis la rakontojn pri sinjorino Curie. Tiam mi aspiris al studo en supera lernejo por fariĝi sciencistino. Diplomite de supera mezlernejo, mi estis senigita je la rajto partopreni en la enira ekzameno al supera lernejo pro malsana korpo. Tiu peza bato min malesperigis tiel forte, ke ŝajne elreviĝis ĉio mia.

Poste mi eklaboris kiel kemia instruistino en la lernejo, kie lernis ankaŭ mi. En la sekva jaro mi refoje estis malpermesita partopreni en la ekzameno pro la

sama kaŭzo. Sed, tio min ne maltrankviligis. Depost tiam mi komencis duonlabori kaj duonlerni. En ses jaroj mi finis studadon de la tuta serio da kemiaj lecionoj donitaj en supera lernejo.

Estas mia kutimo bone plenumi tion, kion mi decidis, kaj estas same al mia instruado. Dum pli ol 20 jaroj mi celkonscie kolektis materialojn pri kemia instruado, studis kemion kaj akumulis sperton en praktikado, kiun mi faris kun la lernantoj en fabrikoj aŭ vilaĝoj.


En 1975 mi estis postenigita al nova lernejo, la 17-a Mezlernejo de Tianjin kun kompare malbonaj kondiĉoj. Mi deziris labori

en lernejo kun favoraj kondiĉoj, pri kio la gvidantaro tamen ne konsentis, mi do vole nevole restis tie labori pene.

Iuj lernantoj de mia klaso estis pli inteligentaj kaj la aliaj malpli. Oni diris, ke "malsaĝa kapo" estas kaŭzita de manko de komprenpovo, pri kio mi neniam kredis. La scienco konstatis, ke de naskiĝo ĝis 8-jariĝo, la infana inteligenteco maturiĝas je 50% kompare kun tiu de la plenkreskulo, kaj tiu de la geknaboj 12-16-jaraj je 100%. La lastaj estas ĝuste en la aĝo de lernado en mezlernejo. Pro tio geknaba inteligenteco dependas ĉefe de instruado de instruistoj.

Por ekspluati la inteligentecon de la geknaboj, mi metas apartan atenton sur plibonigadon de instrua metodo kaj per tio kulturigas ilian sendependan penskapablon.

Usona psikologo Bruner proponis, ke la lernantoj mem esplorsercu novajn sciojn per la materialoj donitaj de instruistoj kaj faru taŭgan konkludon. Kiam mi lekciiis pri la "Tabelo de Kemiaj Elementoj", mi aplikis tiun metodon. Tiel ŝanĝigis la kutima lekciado per pendigo de la tabelo por ke la lernantoj



*Ji Chonghui preparas lecionon.*



ĝin mekanike memoru. Prenante la periodan ŝanĝigon de aranĝo de la eksternukleaj elektronoj kiel ŝlosilon, mi edifis la gelernantojn, ke ili cerbumu kaj deduktu aliajn sciojn. Fine ili mem projektis la tabelon. Tiu metodo ne nur ekscitis ilian aktivecon en lernado, sed ankaŭ levis ilian penskapablon.

En la instruado mi tre atentis la pensmanierojn de la lernantoj. Trovinte bonan pensmanieron, mi tuj analizas al la geknaboj, kial ĝi estas bona. Post kiam ili posedis iun pensmanieron, ilia lerna poentaro altiĝis iom post iom. La lernantoj de miaj du klasoj, diplomitaj en 1979 kaj 1980, atingis bonan sukceson en la enira ekzameno al supera lernejo. La nuna klaso transiris en mian manon antaŭ nelonge. La meza poentaro de la lernantoj por kemio estis 40.6 kaj nun 65.1. Nun certgrade altiĝis la spriteco kaj logikeco de la geknaboj en pensado.

Krom kulturi penskapablon de la gelernantoj, mi helpas ilin posedi ĝustan memormetodon, por ke ili asimilu pli da scioj en mallonga tempo. Laŭ la memora leĝo de psikologio, mi faras ĉion, por ke la geknaboj sin ekzercu en konscia memorado sur la bazo de kompreniĝo, en koneksa memorado de multflankaj scioj, en memorado de similaj aferoj per asociado kaj en memorado de kontrastaj aferoj per komparado. Tiuj metodoj estas kompare efikaj.

Streĉa lernado havigas al la geknaboj malpli da tempo por partopreni en amuzaj aktivadoj, tial mi admonas ilin fari gimnastikajn ekzercojn kaj okulprotektan gimnastikon kaj ofte organizas interesan inteligentan konkurson por vigligi ilian studadon.

Mi vivas en granda harmonio kun miaj gelernantoj. Mi zorgas kaj edukas ilin, kiel patrino. Foje iu lernanto blasfemis instruiston, sed anstataŭ lin riproĉi, mi pacience komprenigis lin, kial la lernantoj devas respekti siajn instruistojn. Tio multe kortuŝis lin. Iu lernanto en nia klaso interrompis sian lernadon pro la forpaso de la patro. Mi organizis la tutan klason por adiaŭi lin kuraĝigante, ke li devas havi altan idealon kaj diligente memlerni por esti talentulo utila al la patrujo, kvankam li ne havas ŝancon partopreni en la enira ekzameno al supera lernejo. Antaŭ nelonge li venis al la lernejo kaj diris, ke li jam vizitas postlaboran universitaton.


Mi sentas min feliĉa inter la geknaboj. Inter miaj lernantoj estas studentoj de la superaj lernejoj de Nankino, Wuhan, Tianjin kaj aliaj urboj, estas laboristoj kaj instruistoj. Ili ofte vizitas min aŭ skribas al mi. Ni, kvazaŭ intimaj amikoj, kune esploras problemojn kaj interŝanĝas spertojn en lernado.

Je duono post la sepa matene

mi venas al la lernejo kaj helpas la lernantojn en ilia memlernado. Dimanĉe mi kutime laboras. Estas feliĉe, ke mia bopatro emeritiĝis kaj plenumas dommastrumadon anstataŭ mi, ekz. aĉeti legomojn, prepari manĝon kaj zorgi pri mia filo. Ankaŭ mia edzo estas instruisto. Li laboras en la 36-a Mezlernejo de Tianjin. Diskutante problemojn ni ĉiam konsultas unu la alian. Kvankam iam ni havas malsamajn opiniojn pri iuj problemoj, tamen ni ricevas edifojn reciproke en la diskutado. En la ĉiutaga vivo ni zorgas unu la alian. Nia filo estas saĝa sed petola. Li lernas ne tiel bone, ĉar ni ne havas pli da tempo por helpi lin en la lernado.

Krom lekci, mi ofte pasigas aliajn horojn en biblioteko. En la lastaj jaroj mi multe legis pri psikologio kaj pedagogio kaj verkis plurajn artikolojn, kiuj aperis en la gazetoj "Eduko de Tianjin" kaj "Matematiko, Fiziko kaj Kemio por Mezlernejanoj". En 1981 mia traktato estis legita en simpozio de la tutlanda kemia instruado kaj estis laŭdata.

*Ji Chonghui helpas siajn lernantojn en eksperimentado.*



# AMIKECA PONTO INTER LA REDAKCIO KAJ LEGANTOJ

de SHAO BIN

**K**ARAJ legantoj, kiam vi malfermas la gazeton "El Popola Ĉinio", vi povas legi, sur la unua paĝo, jenajn vortojn: **GENERALA DISTRIBUANTO: ESPERANTA SEKCIO DE CENTRO DE ĈINAJ ELDONAĴOJ (GUOJI SHU-DIAN), P. O. KESTO 313, BEIJING, ĈINIO.**

Dum la pasintaj multaj jaroj la Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj sendis "El Popola Ĉinio" kaj aliajn Esperantajn eldonaĵojn al diversaj regionoj de la mondo, kaj ĝi mem fariĝis la amikeca ponto inter la redakcio kaj legantoj.

La Esperanta sekcio estas speciala fako de la centro por distribui Esperantajn eldonaĵojn. Antaŭe la Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo distribuis Esperantajn librojn kaj gazeton de

Ĉinio al diversaj regionoj de la mondo. Poste, pro senĉesa plimultiĝo de la distribua kvanto de EPC kaj aliaj Esp-eldonaĵoj Ĉina Esperanto-Ligo transdonis la libroservon al la Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHU-DIAN) la 1-an de julio, 1974. Tiu ĉi fondis Esperantan Sekcion por distribuado de la revuo EPC kaj aliaj Esperantaj eldonaĵoj de Ĉinio al Esperantaj organizoj kaj esperantistoj de pli ol 60 landoj kaj regionoj. Inter la eldonaĵoj la revuo EPC, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo, estas la plej multe legata. La sekcio tutjare varbas abonantojn. Krome, en vintro kaj printempo la sekcio faras ankaŭ abonvarbandan kampanjon de EPC. Niaj abonantoj kaj perantoj estas entuziasmaj, kaj ofte sendas leterojn kaj abonilojn al la sekcio. Ĉiujare ĝi ricevas milojn da leteroj de diverslandaj legantoj.

Kiuj laboras en la sekcio? Ili estas Zhang Zai, Shi Guibao kaj Zhou Qianyun. La sekciestro estas Zhang Zai. En la kvardekaj jaroj li komencis memlerni Esperanton kaj sin okupis per Esperanta laboro jam pli ol 20 jarojn. Shi kaj Zhou ambaŭ estis lernantinoj de la fama veterana esperantisto Venlo Fon. Ili lernis Esperanton en instituto. Diplomite en la sesdekaj jaroj, ili komencis fari la distribu laboron por Esperantaj eldonaĵoj. Estas ĝuste ili, kiuj ĉiutage plenumas varbadon, sendas fakturejn, likvidas konton, respondas leterojn de legantoj.

Ĉu tiuj laboroj estas enuigaj? "Ne," respondis niaj kolegoj. Ili opinias, ke ĝuste tiuj laboroj havigas al ili grandan plezuron, kiun ne povas ĝui aliaj. Kamaradino Shi Guibao diris al mi:

*Laborantoj de la Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj*





“La laboro tre plaĉas al mi. Estas signifoplene, ke ni distribuas la Esperantajn eldonaĵojn de Ĉinio al diverslandaj esperantistoj de la mondo. En la longtempa korespondado mi starigis profundan amikecon kun multaj diverslandaj esperantistoj. Ĉiufoje, kiam ni ricevas leterojn el malproksimaj landoj, ni estas tre ĝojaj. Multaj legantoj sendas leterojn por aboni EPC kaj mendi aliajn eldonaĵojn, prezenti siajn opiniojn pri niaj eldonaĵoj, konigi sialandan Esperantan movadon kaj rakonti sian familian vivon kaj amikecon inter esperantistoj. Kvankam ni ne intervidiĝis kun tiuj legantoj, tamen ni de longe fariĝis malnovaj amikoj.” Dank’ al la peniga laboro de tiuj tri samideanoj, niaj multaj amikoj povas legi ĉinajn eldonaĵojn. Kiel ili ne ĝojas, pensante, ke ili laboras por malproksimaj amikoj!

Ĉiujare ankaŭ la Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHU-DIAN) pogrande distribuas EPC al librejoj en diversaj landoj de la mondo, krom la sekcio. Tio multe faciligas al esperantistoj de iuj landoj aĉeti EPC en siaj lokaj librovendejoj. Oni bedaŭras, ke por esperantistoj en malmultaj landoj estas tre malfacile aboni Esperantajn eldonaĵojn de Ĉinio kaj ofte okazis, ke ili ne povis ricevi la abonitajn numerojn. Se nur la laborantoj de la sekcio ricevas abonilojn aŭ specimenopeton de esperantistoj, ili tuj sendas al ili la gazeton aŭ librojn. Kiam okazas perdiĝo de senditaj eldonaĵoj survoje, ili sentas grandan bedaŭron kaj refoje sendas la eldonaĵojn al la koncernaj abonantoj aŭ mendantoj.

Nia revuo akurate atingas plejparton de la landoj en la

mondo, tio tre kontentigas la legantojn.

Nun la Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN jam starigis longtempajn peradajn rilatojn kun Esp-organizoj kaj esperantistoj de pli ol 30 landoj. Tion, ke ĝi povas fari servojn al la legantoj, ĝi ŝuldas ĉefe al la kunlaboro de niaj perantoj. Tial, la laborantoj de la sekcio ĉiam esprimas sian koran dankon al ili. Ili diris al mi: “La tri kvinonoj de niaj perantoj estas organizaĵoj kaj la du kvinonoj individuoj. Ili laboras multe por ni. La aŭstria peranto sinjoro Leopold Patek estas trajnestro. En la trajno li aktive konigas Esperantajn eldonaĵojn de Ĉinio. Iuj el niaj perantoj estas grandaĝaj, tamen ili estas tre entuziasmaj. Inter ili troviĝas sinjoroj Takenaka Ĝisuke kaj Tokuda Rokuro de Japanio, sinjoro Otto Walder de Svislando kaj aliaj. Sinjoro Gerhard Kunze de FR Germanio iniciate rekomendis al ni novan peranton antaŭ ol forlasi la perantan laboron pro sia granda aĝo. Sinjoro Felix Gomez Martin de Hispanio estas peranto, kiu varbis plej multe da abonantoj de EPC en 1981. La abonkvanto varbita de li en 1982 estis multe pli ol tiu en 1981. Li konsciencie laboras kaj aktive

diskonigas EPC, tiel ke en la lastaj jaroj duobligis la nombro de la abonantoj de EPC en Hispanio. Sinjoro Donald J. Harlow de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko aktive kunlaboras kun ni, tial nia revuo havas pli multe da legantoj en Usono. Sinjoro H. W. R. Petersen de Nov-zelando aperigis artikolon por rekomendi niajn eldonaĵojn en «Nov-zelanda Esperantisto». Li tiel laboras jaron post jaro, kaj lia sindonemo forte kortuŝas nin. Sinjoro Marinko Gjivoje de Jugoslavio faris dum multaj jaroj grandajn klopodojn por solvi la problemon pri pago de aliaj jugoslavaj perantoj. En majo de 1982, kiam li estis grave malsana, li ankoraŭ zorgis pri likvidado de la konto kaj komisiis sian laboron al alia samideano. Malfeliĉe li jam forpasis kaj ni sentas koran malĝojon, ke ni perdis bonan amikon.

Jen la Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN — la amikca ponto inter la redakcio kaj legantoj — kiu estas ĉiam preta servi al diverslandaj esperantistoj. Se vi volas korespondi kun ĝi aŭ fari abonon ĉe ĝi, bonvolu skribi rekte al ĝi. Ĝi servas al vi per livero de EPC-specimenoj aŭ katalogo de Esperantaj libroj de Ĉinio.

*Specimenoj de EPC*



En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekomencas pro la kontribuajoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

LA RED.

**O**KAZE de la 70-jara datreveno de la naskiĝo kaj la 35-jara de la forpaso de la fame konata japana esperantistino Verda Majo, Ĉina Esperanto-Eldonejo eldonis, en la jaro 1982, «Verkoj de Verda Majo» por memori tiun ĉi elstaran internaciisman batalanton. La libro estas rekomendinda al diverslandaj esperantistoj, precipe al junaj esperantistoj, por ke ili komprenu, kiel la juna japana esperantistino vivis kaj batalis en tre malfacilaj kondiĉoj antaŭ 35 jaroj. Ŝi dediĉis sian valoran junecon ne nur al Esperantomovado, sed ankaŭ al la batalo kontraŭ agresado, por defendo de la mondpaco kaj firmigo de la amikeco inter diverslandaj popoloj.

La libro kun pli ol 500 paĝoj enhavas ĉiujn jam trovitajn esperantajjn originalojn kaj tradukojn de Verda Majo. La artikolo «Pri Verda Majo» de la fama ĉina veterana esperantisto Jelezo servas ĉi tie kiel ĝia antaŭparolo. Tiu ĉi artikolo detale prezentas la vivon de Verda Majo. Por ke la legantoj pli facile konu Verdajn Majon mem, la kompilisto metis ŝian rememo-

raĵon «En Ĉinio Batalanta» malantaŭ la artikolon de Jelezo. Ambaŭ verkoj, kompletigante unu la alian, havigos al la legantoj bonan komprenon pri la penso kaj kondutoj de Verda Majo. La rememoraĵo estis plenumita nur je triono, kiu detale priskribas ŝian vivon en la unua jaro post ŝia atingo al Ĉinio. Kiel japana edzino de ĉina juna senlaborulo, ŝi vivadis inter ordinaraj popolanoj de Ĉinio. Ŝi ofte maltrankviliĝis pro la senlaboreco de sia edzo kaj malfacilo de manĝaĵo kaj loĝejo. Iam ili eĉ havis neniun moneron por sin satigi kaj loĝigi. Ŝi vivis malproksime de sia patrio kaj krome ŝi tute ne komprenis la ĉinan lingvon. En la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito, por eviti miskomprenon, ŝi devis kaŝi sian ŝtatanecan. Estas imageble, kiajn malfacilojn ŝi renkontis kaj kian ĉagrenon ŝi sentis siatempe, sed ŝi neniam perdis la kuraĝon. Anstataŭ fuĝi al sia patrolando same kiel aliaj japanaj virinoj, kiuj edziniĝis al ĉinoj, ŝi restis en Ĉinio kaj spertis multajn severajn provojn. Ŝi propraokule vidis teruran masakradon de ĉinaj senkulpaj popolanoj fare de la japanaj invadantoj kaj suferojn de senhejmaj rifuĝantoj. Ŝi vidis ankaŭ la grandan fervoron de la ĉinaj gejunuloj por la kontraŭjapana naciisava movado, kio multe inspiris ŝin. Ŝi aktive partoprenis la propagandon pri la batalo kontraŭ la japanaj agresantoj profitante ĉiujn ŝancojn. Guste tiel ŝi batalis dum la tuta vivo dividante ĝojon kaj malĝojon kun la ĉina popolo.

La verkoj de Verda Majo konsistas el du partoj. En la unua parto estas ŝiaj fruaj verkoj en Japanio, inkluzive tiujn

LIU LING:

## ŜI AMIS NE NU

— Pri «Verkoj

pri la historio de japana literaturo, la stato de la japana proletliteraturo, pri fundamentaj scioj de Japanio kaj pri la vivo de japanaj laboristoj, kamparanoj kaj urbanoj de malaltaj socitavoloj. Tiam ŝi, kvankam lernis Esperanton nelonge, tamen ŝi jam montris sian literaturan talenton en siaj artikoloj per viveca lingvo kaj inspira enhavo.

La dua parto (en Ĉinio) enhavas, krom supre menciita verko «En Ĉinio Batalanta», ankaŭ la romano «Vivantaj Soldatoj» de Isikawa Tatuzoo esperantigita de Verda Majo, kaj la kolekton de esperantaj prozaĵoj de Verda Majo «Flustr' el Uragano». «Vivantaj Soldatoj» priskribas la atakon de la japanaj invadantoj kontraŭ Nankino. La aŭtoro, kiel milita raportisto, verkis kun simpatio al la japanaj soldatoj la romanon, kie troviĝas ŝminkado de la japanaj soldatoj kaj malbeligo de la ĉinaj popolanoj, kio nebuligis la karakteron de la agresita milito. Sed la verkinto kun paciismo kaj humanismo iagrade malkaŝis la kruelecon de la japanaj agresantoj. Pro tio li estis enkarcerigita de la japana registaro. Publike, la romano estis rigore cenzurita kaj multe forstrekita. Verda Majo ne konsentis la vidpunkton de la verkinto, kaj foje-foje hezitis pri ĉesigo de sia traduko. Pri la kaŭzo de ĝia



# SIAN PATRION

e Verda Majo»

fina eldono, Verda Majo skribis en la "Antaŭparolo de l' Tradukinto: ". . . malgraŭ ĉio en Japanio «Vivantaj Soldatoj» ja estas la unua kaj samtempe la lasta, kiu, kvankam kun tia malkuraĝo kaj ŝanceliĝo, certgrade serioze kaj konsciencie priskribas la militon. La buĉado kaj sangverŝado kiu impulsis la aŭtoron, hodiaŭ miloble plivastas kaj pliintensas en Ĉinio. Ne nur ĝi, sed pliparto de la mondo dronas en la ruĝa maro. Nu mi konsolas min, ke la prezento de tiu ĉi malgranda, malnova, kaj iom nebula filmo pri la anguleto ne estas tute sensenca." En la nuna eldono, kun la helpo de japanaj amikoj ni kompletigis la novelon per la parto forstrekita de la japana cenzuristo en ĝia unua japanlingva eldono. Nun ni ĝin publikigis ne por trumpeti

la *bushidon* de la japanaj militaristoj, nek por vekti la malnovan malamon, sed por firmigi la deziron de la ĉina kaj japana popoloj pri amika kunestado generacion post generacio. Nur se oni firme memoros la militon, kiu kaŭzis grandan katastrofon ne nur al la ĉina popolo sed ankaŭ al la japana, kaj singardos kontraŭ la revivigo de la japana militarismo, la pacaj kaj amikaj rilatoj inter la ĉina kaj la japana popoloj povos esti garantiataj.

«Flustr' el Uragano» enhavas dek tri artikolojn, kiuj montras ŝian klaran amon kaj malamon, kaj malkovris la tiranecon de la japanaj militaristoj interne de la lando. Sia edzo Liu Ren skribis en la antaŭparolo: ". . . ĝi estas memoraĵo de l' banala vivo de l' banala virino, tamen spegulas miniaturon de l' epoko. La aŭtoro, juna esperantisto, eligas la justan alvokon bolantan en la koro, propraokule vidante la buĉadon, bruligon kaj frenezan bombardon en Ĉinio fare de la militaristoj el sia patrio. La alvoko ne estas laŭta, sed ĉu vi ne povas rigardi ĝin kiel standardon de l' homara justo, kiel signon de 'amo kaj malamo'? Ĉu vi ne povas vidi en ĝi la sangavidan vizaĝon de la invadistoj?"

En tiu parto estas ankaŭ siaj aliaj 14 artikoloj kaj tradukoj, el kiuj iuj povas esti rigardataj kiel aldonaĵo de «Flustr' el Uragano», dum aliaj traktas Esperanton.

Leginte ŝian verkaron ni facile komprenos, ke ŝi, grandanima, amis ne nur sian propran patrion kaj popolon, sed ankaŭ la popolojn de Ĉinio kaj aliaj landoj de la mondo. Ŝi malamis la japanan imperiismon kaj faŝismon, kaj ŝi batalis por la



Verda Majo (Hasegawa Teru, 1912 — 1947)

paco kaj feliĉo de la tutmonda popolo. Ŝi estis vera internaciisto.

Verda Majo estis intima amiko de la ĉina popolo en ĝia malfacilega tempo. Estas bedaŭrinde, ke ŝi ne povis propraokule vidi la naskiĝon de la nova Ĉinio kaj partopreni en nia ĝojo pro la venko. Kiel ŝi ĝojus, se ŝi vivus hodiaŭ kaj propraokule vidus la emocian scenon de la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj.



CELEBRANTE LA 70-AN  
DATREVENON DE LA  
NASKIĜO KAJ LA 35-AN  
DE LA FORPASO DE  
**VERDA MAJO**  
(1912 — 1947)

LA ĈINA ESPERANTO-ELDO-  
NEJO APERIGIS KOLEKTON  
DE ĜIAJ ESPERANTAJ VER-  
KOJ KAJ TRADUKOJ

## Verkoj de **VERDA MAJO**

Verda Majo estas fama japana esperantistino, internaciisma batalanto kaj granda amiko de la ĉina popolo. En 1937 ŝi venis al Ĉinio kaj kune kun la ĉina popolo ŝi oponis kaj batalis kontraŭ la agresa milito fare de la japanaj militaristoj kontraŭ Ĉinio. Kiamaniere ŝi, kiel japanino, povis vivi kaj labori en Ĉinio batalanta kontraŭ japanaj agresantoj? Malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj ŝi faris meritan kontribuon al la progresema afero de la homaro kaj la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj. La libro enhavas ĉiujn jam trovitajn ŝiajn Esperantajn verkojn kaj tradukojn, kun enkonduko de Ĵelezo. Estas enmetitaj ankaŭ kelkaj valoraj fotoj pri ŝi.

La libro estas frukto de internacia kunlaborado. En la kompilado s-ro Miyamoto Masao kaj aliaj kelkaj esperantistoj en Japanio donis grandan helpon.



Numero: 10-Es-1653  
Formato: 148 × 210 mm  
510 pĝ. bind.  
Prezo £4.20 US\$8.50  
RMB¥13.00

Mendu ĉe: Libroservo de UEA      aŭ      Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj  
Peranto de EPC      (GUOJI SHUDIAN), P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio




# Āgrabla loko por geknaboj


Fotoj de WANG SHOULIANG kaj XINHUA



La Centro de Ĉinaj Geknaboj en Pekino

Parto de la Sciencia kaj Teknika Halo





Ili estas allogitaj.



Modelo de cerba pedunklo






Balono saltas de biciklado


Pafu la celon!



Gimnastetoj



Kiel sonas la tuboj?



Alia parto de la Arta Halo



En la Arta Halo



## Agrabla loko por geknaboj

“Ha! Mi manpremas kun mi mem!” mire ekkrias knabo, kiu unuafoje staras antaŭ sfera spegulo. Liaj kamaradetoj unu post alia manpremas kun si mem kaj eksplodas de rido. Jen sceno ofte videbla en la Scienc-teknika Halo de la Centro de Ĉinaj Geknaboj.

La centro situas en Pekino. Ekde sia oficiala malfermiĝo en aŭgusto, 1982, ĉiutage ĝi akceptas pli ol mil geknabojn kondukitaĵojn de siaj instruistoj aŭ gepatroj. La malgrandaj vizitantoj pasigas agrablajn horojn en la centro.

Tiu centro, la unua en Ĉinio, estas eksterlerneja multflanka praktikejo por geknaboj. Dank’ al aktivadoj literatura, arta, scienca, teknika kaj sporta, la geknaboj lernas diversajn sciojn, fortigas sian sanon kaj ricevas moralan edukon.

La centro kovras areon de 80 mil kvadrataj metroj en bela medio. En ĝi kreskas raraj floroj kaj arboj. La grizaj haloj por geknabaj aktivadoj estas interligitaj per longaj koridoroj. Ili sin kaŝas en verdaj arbaroj.

La Scienc-teknika Halo fondiĝis subvenciate de la Ĉina Scienc-teknika Asocio. Ĝi dividiĝas en kvin ĉambrojn kun ĉirkaŭ cent amuziloj, per kiuj la geknaboj povas lerni elementajn sciojn pri optiko, akustiko, elektro, matematiko, fiziologio kaj aliaj fakoj. La amuziloj estis

zorgeme projektitaj de sciencistoj kaj teknikistoj.

Rigardu, kiel ĝojas geknaboj ĉirkaŭ “biciklo kun balono”! Iu knabo tutforte movas la pedalojn de la biciklo. Ju pli rapide turniĝas ĝiaj radoj, des pli alten leviĝas la balono. La balono moviĝas nur supren kaj malsupren kun nenia deflankiĝo. Tion kaŭzis diferenco de premo inter rapida aerfluo kaj malrapida aerfluo.

Elektrona amuza maŝino por inteligenteca testo altiras multajn cerbumemajn geknabojn. Sidante ĉe tablo, ili serioze respondas diversajn demandojn. Antaŭ alia aparato por lasera holografia reaperigo geknaboj povas vidi tri-dimensiajn figurojn de 7-8 porcelanaj ĉevaloj kaj unu pando, kiuj tre similas al la veraj animaloj. “Ĉi tie oni utiligas fenomenojn de interfero kaj difrakto por vidoregistri kaj reaperigi objektojn”, diris klarigisto.

Tie estas eksponataj transruĝa televidilo, lasera mikrofilmo, supersona alarmilo, arta pavo kun ventumilforme etendita bela vosto kaj aliaj mirindaĵoj. En malluma ĉambro oni videbligas ĉion per transruĝa televidilo. Pavo farita el fibroj de fotokon-

*Aviada ŝajnegilo donacita de la Sanhaja Popola Registaro. Ĝi povas porti 30 infanojn por ke ili ĝuu ŝajnegitan aerflugon.*





*Modelo de okulglobo*

duktanto senĉese variigas kolorojn sur sia korpo. La multaj amuziloj plivastigas la horizonton de la malgrandaj vizitantoj kaj vekas ilian intereson por esplorado de sekretoj de scienco kaj tekniko.

La Halo de Kulturo kaj Arto estas starigita subvenciate de la Kultura Ministerio. Ĝi konsistas el kinoteatro, Arta Halo kaj aliaj. La kinoteatro povas enteni pli ol 600 malgrandajn rigardantojn. Tie estas purpura kurteno, bela scenejo kaj remburitaj seĝoj en ruĝa aŭ tigr-fela koloro. Tie oni projekcias filmon, prezentas teatraĵojn, muzikaĵojn, dancojn kaj aliajn programerojn. En ferioj kaj festotagoj teatraj trupoj de la urbo venas tien por fari prezentadon. Ankaŭ geknaboj prezentas programerojn kreitajn de ili mem. Tie ofte okazas renkontiĝoj de geknaboj kaj literaturistoj, artistoj, sciencistoj, batalherooj, modelaj laboristoj, elstaraj sportistoj kaj diversaj eminentuloj. La Arta

Halo estas ornamita en originala stilo. Starante tie, oni sentas sin kvazaŭ en tropika kaj malvarma zonoj.

En tiu halo estas ankaŭ legoĉambro kaj galerio de pentraĵoj. La legoĉambro havas pli ol dekmil ĉinlingvajn kaj fremdlingvajn librojn, el kiuj la libroj kun tri-dimensiaj bildoj kaj tiuj kun sonbendo estas tre bonvenaj. En la galerio estas eksponataj multaj pentraĵoj premiitaj en la Tutlanda Ekspozicio de Infanaĵ Pentraĵoj.

La fondadon de la Sporta Halo subvencias la Korpokultura kaj Sporta Komisiono de Ĉinio. Tie sub la direktado de trejnistoj iuj geknaboj sin ekzercas per arta gimnastiko, aliaj faras diversajn transkapiĝojn sur tapiŝo kaj triaj partoprenas en tablotenisa konkurso. En vitrinoj en la koridoro de la Sporta Halo estas montrataj diversaj pokaloj gajnitaj de ĉinaj geknaboj en internaciaj sportaj konkursoj.

En la centro estas ankaŭ distrejo por infanoj, kie ili povas sin amuzi per elektraj ludiloj kaj rigardi prezentadon de la Ĉina Pupteatra Trupo.

Por kulturi talentulojn, la centro starigis ĥoron kaj diversajn grupojn por lernigi kaligrafion, pentradon, prezentadon de teatraĵoj, deklamadon, dancojn, ludon de muzikiloj kaj tabloteniso, la ĉinan luktoarton, gimnastikon kaj akrobataĵojn. La partoprenantoj estis proponitaj de la elementaj lernejoj kaj akceptitaj post ekzameno. Ilin instruas diversaj fakuloj.

La fondon de la centro subtenis pli ol cent fabrikoj, scienc-esploraj institutoj kaj aliaj organizoj de pli ol dudek provincoj kaj municipoj. Informiĝinte, ke al la centro mankas io, ili tuj etendis sian manon por helpi. Ili sendis teknikistojn aŭ donacis monon aŭ objektojn. Ankaŭ ŝtataj gvidantoj, koncernaj ministerioj kaj komisionoj, popolaj organizoj kaj iuj individuoj donis al la centro multe da donacoj, kiel libroj, muzikiloj, vojaĝaŭtoj, koloraj televidiloj, vidoregistriloj, magnetofonoj kaj elektronaj amuzaj aparatoj.

La centro nun troviĝas nur en sia komenca periodo. Estonte la tieaj aktivadoj certe pliboniĝos kaj pliriĉiĝos kun plimultiĝo de domoj kaj akumuligo de spertoj.





## SANHAJA E-ASOCIA FONDITA

La 11-an de novembro 1982 okazis la inaŭgura kunveno de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio. Ĝin ĉeestis pli ol 260 novaj kaj malnovaj esperantistoj kaj lernantoj de nia lingvo.

Liu Huozi, respondeculo de la prepara grupo de la asocio, raportis al la kunveno pri la jam finita prepara laboro. Li diris, ke en la lastaj jaroj la Esperanta movado reviglis kaj disvolviĝis en Ŝanhajo, iama centro de la ĉina Esperanta movado, kaj la naskiĝo de la asocio markis la komencon de ĝia nova etapo.

En sia gratula letero al la kunveno, fama ĉina verkisto Bakin diris: "Mi ĉiam rigardas Esperanton kiel bonan ilon por komuniki ideojn de la homaro. Mi amas Esperanton de pli ol 60 jaroj, ne nur pro tio, ke ĝi estas scienca, perfekta kaj facile lernebla kaj komprenebla, sed ankaŭ pro tio, ke multaj personoj, kiuj decidis ellerni ĝin, havas bonan idealon, noblan kaj honestan korton.

Veterana esperantisto Chen Yi, vicsekretario de la Ŝanhaja Partia Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj Luo Zhufeng, vicestro de la Ŝanhaja Sociscienca Federacio, ĉeestis la kunvenon kaj donis var-



*Chen Yi (la tria de dekstre) parolas en la inaŭgura kunveno.*

man parolon. Ili alvokis, ke la ŝanhajaj esperantistoj disvolu la gloran tradicion kaj plifortigu la interkomprenon kaj amikecon inter diverslandaj popoloj per Esperanto.

La kunvenon ĉeestis ankaŭ ŝanhajaj membroj de "Amikoj de Esperanto" kaj fama ĉina ĵurnalisto Lu Yi, famaj pentristoj Shen Roujian kaj Zhang Leping, kaj aliaj famuloj de diversaj rondoj. La Ĉina Esperanto-Ligo, la redakcio de El Popola Ĉinio kaj la Esperanta Sekcio de Radio Pekino sendis siajn reprezentantojn al la kunveno por gratuli. La kunveno ricevis gratulajn leterojn kaj telegramojn de Esperanto-organizaĵoj en diversaj lokoj de Ĉinio.

La kunveno unuvoĉe elektis Bakin kiel honoran prezidanton de la

Ŝanhaja Esperanto-Asocio, S.J. Zee, C. Ŝau kaj Wang Yapu kiel ĝiajn konsilistojn, Liu Huozi kiel ĝian prezidanton kaj Pandiŝon, Wei Yuanshu kaj Sanion kiel ĝiajn vicprezidantojn.

## ESPERANTO INSTRUATA EN LA SHANDONG-A UNIVERSITATO

La 20-an de oktobro 1982 la Shandong-a Universitato fondis Esperantan kurson subtenate de la Shandong-a Sociscienca Federacio. Ĉe la inaŭguro parolis Lu Fan, vicestro de la Instituto de Usona Literaturo sub la Shandong-a Universitato, kaj Jin Shibo, estro de la instrua sekcio de fremdaj lingvoj. La kurson vizitas tridek fremdlingvaj instruistoj.

La 7-an de novembro Liu Xiaojun, Esperanta instruisto en la Shandong-a Universitato, instruis la lingvon al pli ol kvindek kursanoj de la Esperanta Koresponda Lernejo.

## ESPERANTAJ KURSOJ EN OKURBOJ KAJ GUBERNIOJ DE JIANGSU-PROVINCO

Diplomite el la unua porinstruista Esperanto-kurso de Jiangsu-provinco, nombro da personoj fondis en Suzhou, Wuxi, Kunshan, Zhenjiang, Yangzhou kaj aliaj tri urboj kaj gubernioj en Jiangsu-provinco ele-

*Kunvenantoj kantas "La Espero".*





*La inaŭguro de la Esperanta kurso de la Shandong-a Universitato*

## ESP. TELEKOMUNIKA VORTARO

Okaze de la Jaro de la Monda Komunikado en 1983, franca ing. Christian BERTIN pretigas esperantlingvan telekomunan vortaron. Li alvokas ĉiujn helpemajn fakulojn peti de li trilingvan vortaron/francan, anglan kaj hispanan/kaj proponi Esp. tradukojn por kiel eble plej multe da enaj terminoj. Skribu al: ing. Christian BERTIN, CCETT VRE/TDP B.P. 1266, F-35013 RENNES Cedex Francio.

mentajn, progresigajn kaj konversaciajn kursojn de Esperanto, kiujn vizitas pli ol okcent personoj.

## ESPERANTO-KARUSELVOJAĜO AL SES LANDOJ

La 13-an de majo 1983 estos organizita la Internacia Esperanto-Karuselvojaĝo. Ĝi startos el Bruselo kaj vizitados 15 urbojn nome: Luksemburgo, Koblenzo, Kaselo, Herzbergo, Potsdamo, Poznano, Bydgoŝo, Gdansko, Toruno, Varsovio, Ŝĉeĉino, Hanovero, Roterdamo, Antverpeno kaj Ostendo. Eblas ankaŭ vojaĝi al Londono aŭ Parizo. La nomita vojaĝo celas kunlaboron de diverslandaj esperantistoj kaj komunan vizitadon de ses landoj.

Krome, la organizantoj de Esperanto-turisma servo de UEA kaj Monda Turismo aranĝos karavanvojaĝon al la 68-a Universala Kongreso en Pudaĉesto de la 22-a de julio ĝis la 9-a de aŭgusto, laŭ la itinero Bruselo-Pollando-Budaĉesto-Bruselo.

**Inf.:** Eŭropa Esperanto-Centro/Monda Turismo, Montfoyerstr. 37/b.24 B-1040-Bruselo.

## RENKONTIĜO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ DE SOVETUNIO

Inter la 3-a kaj la 16-a de julio 1982 en apudmoskva ripozejo "Ŝĉer-


binka" okazis la 3-a tutsovetia renkontiĝo de blindaj esperantistoj, dediĉita al la 60-jara jubileo de Sovetunio. Ĝin partoprenis pli ol cent personoj el 7 sovetaj respublikoj kaj 31 urboj de la lando.

La programon de la renkontiĝo gvidis V. S. Sedov, estrarano de ASE. Ĝi enhavis prelegojn pri sovetaj respublikoj, pacagado, problemoj de blinduloj, interlingvistiko. Okazis belartaj koncertoj, vespero de internacia amikeco k.a. Dum la renkontiĝo la partoprenintoj perfektigis sian lingvoposedon en kursoj por komencantoj, progresantoj kaj en perfektigaj kursoj.

*Geknaboj de la Esperanto-kurso en la Elementa Lernejo N.D. de la Paco en Belgio*







## Kulturado de virga tero en Ĉinio

de LIU GUOXUAN kaj YU HAILONG

*Rikoltado de tritiko en la 853-a Kultivejo de la "Norda Sovagejo"*


**K**ULTURADO de virga tero en Ĉinio multe disvolviĝis post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. En 1950 kaj 1952, oni komencis kulturebligi virgan teron kaj starigi kultivejojn sinsekve en la Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono kaj la provincoj Gansu, Shandong kaj Jiangsu. Samtempe kun tio oni kulturebligis dezertojn en Hainan-insulo kaj Leizhou-duoninsulo en la suda parto de Guangdong-provinco, en la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj la provincoj Yunnan kaj Fujian por kulturi kaŭĉukajn arbojn kaj aliajn plantaĵojn, tiel ke la lokoj fariĝis produktaĵoj de natura kaŭĉuko de Ĉinio. En 1958 fondiĝis centoj da grandaj ŝtataj kultivejoj meĥanizitaj kun 100 000 la-

borantoj en la orienta parto de Heilongjiang-provinco. Ankaŭ aliaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio sinsekve starigis multe da kultivejoj apud lagoj, en montetaroj, ĉe marbordoj kaj urbaj ĉirkaŭaĵoj.

En 1981, en la tuta lando estis sume 2 094 kultivejoj kun pli ol 4.9 milionoj da laborantoj, 4.4 milionoj da hektaroj da agroj, 330 000 hektaroj da kaŭĉukaj arbaroj kaj 120 000 hektaroj da fruktoĝardenoj, morusĝardenoj kaj tekultivejoj. Tiuj kultivejoj havis pli ol 50 000 grandajn kaj mezgrandajn traktorojn, 16 000 kombajnojn, 27 000 aŭtojn kaj 10 miliardojn da juanoj kiel fiksan kapitalon. Krome estis ankaŭ starigitaj por tiu branĉo

35 universitatoj, institutoj kaj teknikaj kolegioj, 14 000 elementaj kaj mezgradaj lernejoj kaj 10 000 scienc-esploraj institucioj kun 48 000 diversaj fakuloj.

Dum la pasintaj 30 jaroj la ŝtataj kultivejoj faris grandan kontribuon al la ŝtato per livero de greno, industriaj materialoj, urbaj almanĝaĵoj kaj eksportaĵoj. Ĝis 1981 ili jam produktis sume 95 milionojn da tunoj da greno, samtempe ili ĉiujare liveris al la ŝtato grandan kvanton da natura kaŭĉuko, kotono, oleo, sukero, viando, feloj, teo, fruktoj, lakto, ginsengo kaj junaj cervokornoj kaj malgrandan kvanton da agavaj fibroj, palmoleo, kafo, pipro kaj aliaj. Inter tiuj produktaĵoj natura



*Kampoj de la 129-a Kultivejo en Xinjiang*

kaŭĉuko, sojfabo por eksportado kaj freŝa lakto provizita al urboj konsistigis respektive pli ol 90% de la totalaj produktokvantoj de la tuta lando.

### OAZOJ EN GOBIO

La plejparto de la ŝtataj kultivejoj de Ĉinio estas starigita en dezertoj, marĉejoj kaj landli-

*Kaŭĉukarba ĝardeno de Nantian-kultivejo en Guangdong*



maj regionoj kun malmultaj loĝantoj kaj malbonaj naturmedio kaj vivkondiĉoj.

La Xinjiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono situas ĉe la nordokcidenta landlimo de Ĉinio. Dum miloj da jaroj tie estis multaj sablaj dezertoj. Nun, de Tarim-rivero ĝis Junggar-stepo, de Altay-montregiono ĝis Turpan-baseno aperis pli ol 170 kultivejoj kaj paŝtejoj, kie oni kulturebligis milionon da hektaroj da virga tero, kreskigis 40 000 hektarojn da arbarzonoj, konstruis 78 akvokonservejojn kaj pli ol 7 000 putojn kaj fosis pli ol 54 000 kilometrojn da kanaloj. La antaŭaj dezertoj nun fariĝis oazoj abundaj je bovoj, ŝafoj kaj greno.

Shihezi en Gobio estas 146 kilometrojn okcidente de Urumĉi, la ĉefurbo de la aŭtonoma regiono. Antaŭe tie estis nur vilaĝeto kun dekoj da familioj, nun ĝi fariĝis nova urbo, kiu kovras areon de 22 kvadrataj kilometroj. Vidante la novajn

konstruaĵojn unu apud alia, interkruciĝantajn stratojn asfaltitajn kaj prosperajn arbojn, oni ofte forgesas, ke ĉi tie estas la rando de Junggar-dezerto. Laŭ statistiko, en la urbo Shihezi 1 190 000 arboj estis nove plantitaj. En ĝia antaŭurbo troviĝas 18 grandaj farmejoj kun ĉ. 170 000 hektaroj da agroj, kie oni kulturas kotonon, tritikon, rizon, sukerbetojn k. a. Konforme al tio estis starigitaj pli ol 140 entreprenoj de lana kaj kotona tekstilado, manĝaĵoj, kemia industrio, elektro, fabrikado kaj riparado de agrikulturiloj k. a., kies produktaĵoj nombras ĉ. mil specojn. Samtempe multe progresis tie la ekstera komerco, scienca esplorado, kulturo kaj eduko, higieno kaj korpokulturo. Ĝi kiel brila perlo altiras al si ĉinajn kaj eksterlandajn turistojn.

### NORDA SOVAGEJO — GRENEJO

En Heilongjiang-provinco de la nordorienta parto de Ĉinio troviĝas du ebenajoj Sanjiang kaj Songhua-Nenjiang kun pli ol 6.6 milionoj da hektaroj da agroj, kie la grundo estas fekunda kaj akvoenergia riĉfondo abunda, senprujna sezono daŭras 120—130 tagojn. Tiuj favoraj kondiĉoj tre taŭgas por kreskigo de tritiko, sojfabo kaj maizo. Tamen la loko restis neekspluatata pro multeco de marĉoj kaj frosteco en vintro, kaj oni nomis ĝin “Granda Norda Sovagejo”.

De 1956 ĝis 1958, granda nombro da terekspluatantoj venis tien. Ili kulturis 2 milionojn da hektaroj da virga tero, starigis 105 ŝtatajn kultivejojn kun altgrada meĥanizado, faris konstruaĵojn, kiuj povas irigacii 100 000 hektarojn da kampoj, kaj



ŝoseojn longajn je 6 500 kilometroj, funkciigis elektrokondukan linion pli ol 20 000 kilometrojn longan kaj konstruis pli ol 150 urbetojn.

Nun tiuj kultivejoj jam fariĝis la plej grandaj bazlokoj de greno en Ĉinio. La totala areo de iliaj agroj preskaŭ konsistigas 45% de tiu de la ŝtataj kultivejoj de la tuta lando.

### “PERLO EN SUDA ĈINIO”

Kaŭĉuko, kiel grava materialo en la ekonomia konstruado, estas multe produktata de ŝtataj kultivejoj de Ĉinio.

La produktejoj de la ĉina kaŭĉuko sin trovas en la tri provincoj Guangdong, Yunnan kaj Fujian, kaj la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono inter 18° kaj 24° de norda latitudo. Frue en la kvindekaj jaroj oni starigis tie 155 grandajn ŝtatajn kultivejojn kun kulturado de kaŭĉukarboj kiel sia ĉefa tasko kaj sukcese kreskigis tie 330 000 hektarojn da kaŭĉukarbaroj. Tiu sukceso pruvis neĝusta la konkludon de iuj fremdlandaj specialistoj, ke en la loko norde de 17° de norda latitudo estas neeble kulturi kaŭĉukarbojn. Nun Ĉinio jare produktas 120 000 tunojn da kaŭĉuko, kaj per tio ĝi okupas la sesan lokon inter la 37 kaŭĉukproduktantaj landoj en la mondo.

Ĉinio komencis planti kaŭĉukarbojn en 1904, tamen ĝis 1949 restis nur 200 hektaroj da kaŭĉukarboj.

La kultivejo Xilian en la nordokcidenta parto de Hainan-insulo fondiĝis en 1951. En la komenco ĝi havis nur malmultajn malnovajn kaŭĉukarbajn ĝardenojn, kaj la aliaj partoj estis plenkovritaj de arbedoj

frekventataj de aproj kaj bojcervoj (*Cervulus muntjac*). Terekspluatantoj, elmigrantaj ĉinoj revenintaj al la Patrio kaj tieaj kamparanoj starigis tendojn sur la dezerta monto por ordigi la malnovajn kaŭĉukarbajn ĝardenojn. Ili laboris kaj vivis sub malfacilaj cirkonstancoj, tamen en ne tre longa tempo ili jam forhakis per ŝpatoj kaj pioĉoj ĉiujn arbedojn kaj herbaĉojn en tiuj 200 hektaroj da kaŭĉukarbaj ĝardenoj; poste ili denove sterkis la ĝardenojn per bonkvalita organika sterko. La dezertaj kaŭĉukarbaj ĝardenoj baldaŭ fariĝis freŝverdaj. En vintro, kiam maturiĝis la semoj de kaŭĉuka arbo, la laborantoj de la kultivejo tagnocte gardis en la ĝardenoj por ĝustatempe kolekti tiujn valorajn semojn kaj rapide sendi ilin al aliaj lokoj. Nun la kultivejo kun 8 000 membroj havas pli ol 4 000 hektarojn da kaŭĉukarboj, inter kiuj 1 070 000 entranĉitaj arboj ĉiujare produktas pli ol 22 000 tu-

nojn da seka kaŭĉuko. Ĝi liveris al la ŝtato 100 000 000 juanojn por akumulo, kiu trioble egalas al la totala investo de la ŝtato.

### KOMBINATO DE AGRIKULTURO, INDUSTRIO KAJ KOMERCO

En la lastaj jaroj la ŝtataj kultivejoj de Ĉinio disvolviĝis en la novan etapon, kun leviĝo de kombinato de agrikulturo, industrio kaj komerco kiel signo. Ĉi-flanke la Changjiang-a Agrikultura, Industria kaj Komerca Kombinato en Chongqing de Sichuan-provinco marŝas fronte en la tuta lando.

Chongqing situanta en la supra baseno de Jangzi-rivero estas bela monturbo, plej granda en sudokcidenta Ĉinio. La Changjiang-a Agrikultura, Industria kaj Komerca Kombinato estis starigita surbaze de la antaŭa Buroo de Virgtera Kulturado de la urbo. Ĝi konsistas

### KIOM LEVIĜIS LA VIVNIVELO DE ĈINAJ KAMPARANOJ?

**E**N la lastaj jaroj multe leviĝis la konsumnivele de ĉinaj kamparanoj. Ilia konsumnivele de fundamentaj vivbezonoj en 1981 kreskis je 90.2% kompare kun tiu en 1978; ilia pokapa aĉetpovo por konsumaj varoj en 1981 atingis 117.4 juanojn, je 84.9% pli multe ol tiu en 1978. La pokapaj konsumkvantoj de greno, oleo, porkaĵo, sukero, kotonŝtofo kaj karbo en 1981 estis

respektive 219.95 kg., 2.05 kg., 9.75 kg., 2.95 kg., 8.83 m. kaj 84.5 kg., t.e. je 13%, 97%, 52%, 30%, 32% kaj 44% pli multe ol tiuj en 1978.

La aĉetpovo de ĉiu centoda kamparanoj por kudromaŝinoj, horloĝoj kaj radioriceviloj en 1981 pligrandiĝis respektive je 58.3%, 75% kaj 98% kompare kun tiu en 1978; kaj tiu por televidiloj kreskis 4-oble en la sama tempo.

el 22 kultivejoj kaj paŝtejoj, unu laktokompanio kaj du teaj prilaboroj. Ĝi havas 9 000 laboristojn kaj oficistojn, pli ol 270 hektarojn da agroj, 1 000 hektarojn da frukto- kaj tegardenoj kaj pli ol 4 700 hektarojn da akvosurfaco por fiŝbredado. Krom sin okupi pri agrikulturo, ĝi ankaŭ faras laktajojn, enladigitajn fruktojn, kukajojn, teon, vinon, sukeron kaj paperon, konstruas ŝipojn, produktas konstruajn materialojn kaj riparas agrikulturajn maŝinojn kaj vendas parton de siaj produktaĵoj. Ĝi ankaŭ disvolvas diversformajn ekonomiajn kunlaborojn inter kultivejoj, inter kultivejoj kaj komunumoj kaj brigadoj, kaj inter kultivejoj kaj aliaj industriaj kaj komercaj departementoj, kio multe profitigis la kombinaton en ekonomio. En 1979, t. e. en la unua jaro post la starigo de la menciita kombinato, la totala produktovalor de ĝiaj industrio kaj agrikulturo kreskis 20% kompare kun tiu en 1978, tiu de 1980 kaj 1981 kreskis 40% kompare kun tiu en la respektive pasinta jaro; la plej alta jara interezo atingis 5 milionojn da juanoj, per kio ĝi kovris la pasintan deficiton.

Samtempe kun tio ankaŭ kultivejoj en multaj lokoj de la tuta lando starigis tiajn kombinitojn. En la fino de 1981 pli ol 1 200 kultivejoj prove starigis tiajn kombinitojn, kiuj konsistigas 58% de la totala sumo en la tutlandaj kultivejoj. Laŭ la statistikoj de la ok kombinitoj, pli frue starigitaj en Jiangsu-provinco kaj urboj Chongqing, Tianjin, Wuhan kaj aliaj, en 1981, la totala produktovalor de iliaj industrio kaj agrikulturo pliiĝis preskaŭ duoble kompare kun tiu en la tempo, kiam la kombinitoj ankoraŭ ne starigis.

## VIDINDAJ LOKOJ

# La termofontaro Conghua

de LIANG FENG

**L**A fontaro Conghua estas fame konata pro sia mola kaj varma akvo. En verda montaro, kie troviĝas la fontaro, murmuris riveretoj kaj plaŭdas falakvoj. Jen bela loko por kuracado kaj turismo en Ĉinio.

La fontaro distancas je 81 km. for de Kanton, la ĉefurbo de Guangdong-provinco. Zigzaga rivereto dividas la fontan regionon en du partojn, orientan kaj okcidentan, kiujn kunligas blanka arkponto. Ĉie en tiu turisma loko ŝprucas termofontoj kaj prosperas floroj kaj arboj. Frumatene la nebuloj, leviĝantaj de la fontoj, kovras la riveretojn, lagojn kaj arbarojn. En la aero ŝvebas bonodoro elspirata de la floroj kaj herboj. Estas rava la pejzaĝo en tiu ĉarma kaj kvietaj loko.

La fontaro konsistas el dek unu fontoj. Iuj situas ĉe riverbordoj, aliaj en riveroj. Ĉar la fontoj ne estas same profundaj, tial iliaj akvoj havas malsamajn temperaturojn. Iuj eĉ varmas je 70°C, dum plejparto de ili je

50°-60°C. Ĉe ĉiu fonto estas cisterno, el kiu akvo estas pumpita en turon kaj poste kondukata al duŝejoj de la sanatorioj, hoteloj kaj vilaoj per akvokondukiloj. La akvo estas pura, senkolora kaj senodora. Duŝado per tia akvo estas utila al sangocirkulado, refreŝigo kaj levo de epiderma imuneco. La akvo estas efika ankaŭ por kuraci hipertension, artriton, stomakan ulceron, neŭrastenion kaj dermatozon.


En la fonta regiono troviĝas tri kaskadoj Xiangfen, Feihong kaj Baizhang, kiuj kune formas alian pejzaĝon. Ĉe la montpiedo bele sonas ritma plaŭdado — Xiangfen ŝprucigas perlajn ŝaŭmojn, Feihong prezentas akvokurtenon similan al ĉielarko kaj Baizhang tondras kiel granda pendanta torento. En la lastaj jaroj oni konstruis gigantan akvorezervejon Tianhu, kiu tenas superakvon el la montoj por servi al la tieaj hidroelektrejoj. Sube de la akvorezervejo kuŝas artefarita lago, ĉe kies bordo





# PEJZAĜO DE CONGHUA

(LEGU LA ARTIKOLON "LA TERMOFONTARO CONGHUA" EN TIU ĈI NUMERO)

Fotoj de LI CHUNGENG




La ponto Bilang









Ombroplena pado



Hotelo apud rivero



Ŝtona statuo de diino en la artefarita lago



**FOTOJ FARITAJ  
DE E-ISTOJ**



Sunplenaj aŭtunaj folioj

de JEANNE OEHRI (Francio)



staras statuo de diino kun ŝve-  
bantaj manikoj. Pro la artaĵo la  
medio gustas je mito.

La belaj kaj perfekte ekipitaj  
hoteloj kaj la someraj domoj  
ĉiuj rigardas al la akvo, kun  
dorso direktata al la montpiedo.


La domego Hubin estas unu  
el la plej famaj hoteloj en la  
loko, kies bazamento duone sin  
kaŝas en la rivereto. La hotelo  
kaj la paralele staranta Domo  
de Klubo ŝajnas du luksaj ŝipoj  
ankritaj ĉe la riverbordo. Tie  
oni sentas sin kvazaŭ en bela  
bildo. En la domego estas diver-  
saj ĉambroj kun necesaj termo-  
fontaj ekipaĵoj.

Ĉe la orienta bordo de la zig-  
zaga rivereto kuŝas granda bela  
ĝardeno kun artefarita lago, ĉir-  
kaŭ kiu punktiĝas dek kelkaj  
someraj domoj. La florejoj,  
ekranmuroj, arkpordoj, zigzagaj  
koridoroj, sinuaj padoj kaj pon-  
tetoj estas aranĝitaj tre harmo-  
nie kun la someraj domoj, pro

kio la ĝardeno riĉas je pejzaĝoj  
malsamaj.

En la fonta regiono prosperas  
multspecaj arboj kaj floroj. Sur  
la montoj kreskas dekmiloj da  
liĉarboj, umearboj, prunarboj,


magnolioj, bambuoj, pinoj, ci-  
presoj kaj aliaj. Estas menciin-  
de, ke la tieaj liĉioj estas tre bon-  
gustaj. Junie kaj julie la matu-  
raj liĉioj, ruĝe brilantaj sub la  
suno, pezas sur la arboj. Kiel  
rava estas la pejzaĝo!



*La akvofalo Tianhu*

---

## LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. La gubernio Zhaocheng
2. Datong
3. Conghua
4. La ebenaĵo Xuhuai
5. La gubernio Dushan
6. Tianjin



*Stalagmitoj kaj stalaktitoj  
en la subtera akvorezervejo*

# ELEKTRO EL SUB LA TERO

de ZHENG YANG

— *Vizito al la subteraj hidroelektrejoj  
en la gubernio Dushan de la provinco Guizhou*

**K**IAM mi preterveturis la Buji- kaj Mjaŭ-naciecan Aŭtonoman Subprovincon en la suda parto de Guizhou-provinco, mi rimarkis inter montoj verdajn kaj prosperajn rizkampojn, foje refoje aŭdis maŝinbruon en kamparaj urbetoj kaj vespere vidis elektrajn lampojn brilantajn en vilaĝoj punktiĝantaj en montaro. Tamen en la ĉirkaŭaĵo troviĝas nek altaj elektrejoj fumtuboĵ nek longdistancaj altensiaj kabloj. De kie do oni akiris akvon por irigacii kampojn kaj elektron por funkciigi maŝinojn kaj prilumi montvilaĝojn? La demando instigis min halti survoje en la gubernio Dushan por viziti ties hidroelektran administracion.

Min varme akceptis Deng Anwei, funkciulo de la administracio, kiu bone konas la hidroelektran produktadon en la gubernio. Por solvi mian demandon li akompanis min al kelkaj subteraj hidroelektrejoj, kiujn konstruis la lokaj popolanoj de buji- kaj mjaŭ-naciecoj.

La gubernio situas ĉe la transira zono inter Guizhou-altebenajo kaj Guangxi-baseno kaj estas 75-procente kovrita de juna karsto. Tie troviĝas multe

da karstaj kavernoj kaj kaŝitaj riveroj, kiuj kombiniĝas en subteran akvosistemon — la fonton de la T-forme dispoziciitaj tri riveroj Niuhe, Duliujiang kaj Qishui. Dum nia veturo Deng donis al mi praktikan klarigon pri la loka geomorfologio: la malaltaj dekoraciitaj per kelkaj unuopaj montetoj estas la provizejoj de subtera akvo, la malaltaj inter apartigitaj montbazoj estas ĝiaj trafluejoj, kaj la trog-formaj valoj inter sinsekvaj karstaj montoj, kies bazoj ligiĝas unuaj kun aliaj, prezentas sin kiel ĝiaj elfluejoj. Li diris, ke kvankam la gubernio abundas je pluvo, tie tamen videblas neniu konstanta rivero sur la tero — la pluvakvo plejparte tralikiĝis en subterajn fluejojn tra karstaj kavernoj kaj fendoj. Ĝis la 60-aj jaroj trosekeco kaj inundo, precipe la antaŭa, ofte atakis la lokon, kie, kiel oni diris, “brulas la tero se ne pluvas kelkajn tagojn, sed ĉiuj kampoj subakviĝas post pluvego”. La diversnaciecaj loĝantoj multe suferis de la malfavoraj naturaj kondiĉoj kaj vivis en mizero. Havante nenian scion pri elektro, oni tiam uzis homforton por senŝeligi rizon kaj kerosenon

por lumigado. Nur en 1951 oni instalas dizelgeneratoron kun kapacito de 10 kilovattoj por solvi la problemon de prilumado en registaraj oficejoj.

En la 60-aj jaroj, laŭdire, oni konstruis multajn surterajn akvokonservejojn, sed pro likado ili apenaŭ donis ian efektivan utilon. Rezulte de katastrofa trosekeco en 1972, la produktokvanto de greno en la gubernio duone reduktiĝis kompare kun tiu en ordinaraj jaroj. Tial, oni devis serĉi alian vojon por sin levi el malriĉeco.

Kiam ni atingis la produktan brigadon Wang'ou de la popola komunumo Yaobang, ni subite vidis super la vilaĝo multfoje interkruciĝantajn konduktilojn kaj aŭdis muelejan maŝinbruon. Ni do decidis veturi rekte al ĝia elektrejo. Nia ĵipo fine haltis antaŭ tensialtiga transformatoro staranta sur intermonta altaĵo, sed neniu elektrejon ni povis vidi ĉirkaŭ ni. Ni iris antaŭen laŭ mallarĝa tranĉeo, ĉe kies fino parto de tegmento elrigardis el sub la grundo. Mia akompananto diris, ke tie estas la subtera elektrejo Wang'ou konstruita en subĉiela kaverno. Fakte ĝi sin kaŝas en 4 metrojn



profunda ŝakto kun diametro de 20 metroj, kiun oni elhakis en malmola kvarcito post diskrevigo de natura kaverno por kunligi ĝin kun la subtera rivero. Malsuprenirinte laŭ ŝtuparo, ni vidis sur ĝia supra etaĝo 50-kilovattan generatoron kaj elektrodistribuaĵajn instalaĵojn. Maldekstre troviĝas subtera akvokonservejo tute enfermita kun flankakvo longa je 2.5 kilometroj kaj kapacito de 180 000 kubmetroj. Laŭlonge de altprema akvokondukilo kun 7-metra faldistanco, ni descendis en la ĉambron por la akva turbino. Ĉe la lumo de elektra lampo ni vidis, ke la subtera akvo, produktinte laboron sur la turbinajn padelojn, brue kuras en malluman groton. Ni informiĝis, ke ĉe la malsupra parto de tiu fluo troviĝas alia subtera elektrejo kun kapacito de 50 kilovattoj.

Estus sufiĉe facile konstrui tiun malgrandan elektrejon per modernaj maŝinoj, sed la lokaj konstruintoj, anstataŭ tiaj maŝinoj, havis siatempe nur martelojn, ferstangojn kaj dinamiton. Ili boris en la malmola kvarcito, platis la montsupron per eksplodigado, elhakis la ŝakton kaj fine elkondukis la akvon el la kaŝita rivero, kiu dormis milojn da jaroj sub la tero, por servi ĝin al la popolo. Peniga estis la tuta konstruado. Mi informiĝis, ke kunportante kun si laborinstrumentojn, manĝaĵojn


kaj litaĵojn, oni tiam venis al la konstruejo kaj diligente laboris postulante nenian pagon. Ili devokonscie faris ĉion eblan por kontribui al starigo de la elektrejo. Kun mastra respondeco ili reformas la naturon kaj konstruas sian hejmvilaĝon sin apogante sur siaj propraj fortoj, kio vekis ĉe mi grandan respekton.

La elektrejo Wang'ou estas subtera konstruaĵo servanta por elektroproduktado, irigacio kaj drenado. La elektrokvanto, kiun ĝi povas doni, estas tre malgranda, kompare kun tiu en disvolviĝinta industria regiono, sed ĝi ludas gravan rolon en la postrestinta dezerta montaro. Dank' al la subtera akvokonservejo, altiĝis la akvonivelo en la supra baseno. Oni konstruis 22 dizelajn pumpstaciojn kaj 3 elektrajn pumpstaciojn, kiuj irigacias pli ol 200 hektarojn da kampoj, tiel ke la po-hektara produktokvanto de greno leviĝis de 2 250 kg al 4 500 kg; samtempe la 50-kilovatta generatoro liveris al pli ol 520 kamparanaj familioj la bezonatan elektron por prilumado kaj gren-prilaboro. La lokaj kamparanoj, kiuj neniam antaŭe uzis elektrajn lampojn, rigardis tiajn lampojn kiel perlojn prenitajn el subtera palaco.

Forlasinte la elektrejon Wang'ou, ni veturis al la elektrejo Tiechangping de la sama komunumo kaj elektrejo Wangtun de Shuiyan-komunumo.

La unua situo en Dahei, natura karsta kaverno ĉe monttalo, kiu altas 8 metrojn kaj larĝas 10 metrojn. En la kaverno pendas diversformaj stalaktitoj kaj fluas akvo kun bruo. Troviĝas supre kaj malsupre de ĝi du subteraj riveroj kaj unu profunda lageto, sur kiu kuŝas du boatoj por vizitantoj. Oni dragis la supran riveron, ŝtopis al ĝi la liktruojn, starigis transfluigan digon, masonis alfluigan kanalon, konstruis subteran akvokonservejon kun flankakvo longa je 5 kilometroj kaj kapacito de 500 000 kubmetroj kaj, utiligante la 8-metran akvofalon inter la du riveroj, starigis elektrejon kun kapacito de 100 kilovattoj. La elektrejo Wangtun, kiel la sola elektrejo funkciigata de la gubernio dank' al utiligado de la 156-metra akvofalo ĉe la elfluejo, situas malsupre de la elfluejo de la subtera rivero Wangtun kaj estas du-ŝtupa elektrejo kun kapacito de 2 000 kilovattoj.

La ekspluato kaj utiligo de subtera akvo en la gubernio estas subtenata kaj helpata de ŝtataj sciencaj fakoj kaj de la registaro. Post la tri-jara ĝenerala esplorado, en 1973 la sciencaj esplorantoj el la Geografia Instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj kaj el la geologia fakultato de la Guizhou-a Politeknika Instituto ekhavis fundamentan konon pri la formiĝo, situo, flukvanto kaj direktiĝo de la 22 subteraj riveroj en la gubernio (kun totala longeco de ĉirkaŭ 5 000 kilometroj) kaj ellaboris kompletan reordig-projekton, kiu prenas akvobaradon kiel la ĉefan metodon kaj samtempe donas atenton al fluodeterno, altiĝo de akvonivelo, elektro-produkto kaj drenado de superakvo. La registaro prezentis la politikon doni rajtojn de



*Akvoturbino de la subtera elektrejo Wang'ou*

administrado, posedo kaj dispo-  
no de elektrejoj al tiuj, kiuj ilin  
konstruis, kaj praktikis la prin-  
cipon, ke la ŝtato pagu trionon,  
pruntedonas trionon de la mono  
bezonata por ĉiuj elektrejoj in-  
stalajoj kaj la koncernaj pro-  
duktaĉmentoj mem pagu tri-  
non, tiel ke la popolanoj kun  
mobilizita entuziasmo funkci-  
gas elektrejojn per la kolektiva  
forto. Ekde 1975 la totala ka-  
pacito de la generatoroj en la  
gubernio kreskis meznombro po  
200 kilovattoj ĉiujare kaj nun  
nombras 3 560 kilovattojn. In-  
teralie troviĝas 20 subteraj hi-  
droelektrejoj, ĉiu kun kapacito  
de pli ol 50 kilovattoj.

La produkto de hidroelektro  
estas malkara kaj senpolucia, kaj  
povas kombiniĝi kun la kam-  
para irigacio kaj utili al la uzo  
de akvo por pluraj celoj. Mal-  
grandaj hidroelektrejoj povas  
konstruiĝi ĉeloke kaj liveri elek-  
tron al la kamparanoj, kiuj dis-  
loĝas en vastaj montregionoj.  
En tiaj elektrejoj ni vidis efikan  
vojon rapidigi la modernigan  
konstruon de agrikulturo. La  
konstruado de subteraj hidro-  
elektrejoj en la gubernio Dushan  
riĉigis al ni la sperton por la  
ekspluato kaj utiligo de subtera  
akvo en la vasta karsta regiono  
de sudokcidenta Ĉinio kaj rom-  
pis la aserton en hidrogeologio,  
ke oni ne povas grandskale eks-  
pluati hidroelektron en karstaj  
regionoj. En la kunveno pri ak-  
voutiliga projektado en karstaj  
regionoj, kiu okazis en la urbo  
Nanning en 1975, oni disvastigis  
la sperton de la gubernio. Nun  
en la Buji- kaj Mjaŭ- nacieca  
Aŭtonoma Subprovinco stariĝis  
600 malgrandaj hidroelektrejoj  
kun totala kapacito de 32 200  
kilovattoj, kaj el ĝiaj 447 popo-  
laj komunumoj 350 komencis  
uzi elektron.

FENG QI:


## *La unuaj virinaj piedpilkaj teamoj en Ĉinio*

**A**NTAŬ tri jaroj multaj en  
Ĉinio ridis je la virina pied-  
pilka konkurso, opiniante, ke ĝi  
estas absurda. Nun ili jam ŝan-  
ĝis sian opinion. En la lasta jaro  
okazis en Pekino la Unua Virina  
Piedpilka Invita Turniro de  
Ĉinio, kiun partoprenis teamoj el  
dek provincoj kaj municipoj. Ĉe  
ĉiu matĉo ĉiuj sidlokoj por ri-  
gardantoj estis okupataj. Kvan-  
kam la ĉinaj piedpilkistinoj plej-  
parte estis trejnitaj nur iom pli  
ol du jarojn dum la postlabora  
tempo, tamen nemalmultaj el ili  
jam posedis la teknikojn de kap-  
puŝo, piedpuŝo, retropiedbato,  
returna golŝoto kaj aliaj movoj.  
La teamoj de la provincoj  
Shaanxi kaj Guangdong gajnis  
respektive la ĉampionecon kaj

subĉampionecon en tiu turniro.  
Ili montris sian lertan teknikon  
en kolektiva kunagado, mallong-  
distanca pilktransdonado kaj  
aliaj manovroj. Iuj piedpilk-  
amantoj ĝoje diris: "Ni ne aten-  
dis, ke la piedpilkistinoj ĵus trej-  
nitaj jam atingis tiel altan nive-  
lon. Vere laŭdinde!"

La virina piedpilkado estas  
nova sporta branĉo en la mon-  
do, kaj ĝi komenciĝis en 1979 en  
Ĉinio. Tiam nombro da lernan-  
tinoj de la urbo Xi'an, Shaanxi-  
provinco televidis ludadon de  
eksterlandaj piedpilkistinoj kaj  
tre interesiĝis pri tiu sporto.  
Poste ili sendis leteron al la  
Korpokultura kaj Sporta Komi-  
siono de la Ĉina Popola Respu-  
bliko kun la peto fondi virinan

*Sturmo al la golejo de la rivalo*





piedpilkan teamon. Ili peto estis aprobata de la komisiono. Depost tiam aperis virinaj piedpilkaj teamoj unu post alia en multaj lokoj de nia lando. Poste oni organizis konkursojn inter provincaj teamoj.

En la gubernio Meixian de Guangdong-provinco, vaste konata kiel "la hejmloko de piedpilkado", nun estas 27 virinaj piedpilkaj teamoj kaj ĉ. 600 knabinoj ofte ludantaj piedpilkon. En la Printempa Festo ĉiujare okazas la tutgubernia virina piedpilka konkurso. La teamo de Meixian dufoje gajnis la ĉampionecon de la provinco. La teamo de la provinco, kiu partoprenis en la invita turniro, estis fondita ĉefe sur la bazo de la gubernia teamo.

La piedpilka ludo estas tre vigla en la Chuxiong-a Ji-nacieca Aŭtonoma Subprovinco de Yunnan, kie koncentre loĝas nacimalplimulto. Antaŭ ol fondi virinan teamon, iuj junulinoj tie jam piedpilkis kune kun junuloj. En 1980 la aŭtonoma subprovinco aranĝis la unuan virinan

piedpilkan konkurson kaj ĝin partoprenis 54 teamoj. En 1981 okazis en Chuxiong la kvinprovinca virina piedpilka invita turniro. Depost tio la virina piedpilka ludo estis difinita kiel unu el la oficialaj sportaj konkursoj de la subprovinco. La nombro de la virinaj teamoj, kiuj partoprenis en la piedpilka konkurso okazigita de la aŭtonoma subprovinco en 1982, jam atingis 65.

La virina piedpilkado leviĝis ne nur en Pekino, Tianjin, la Nordoriento de Ĉinio, sed ankaŭ en Tibeto.

La plejparto de la piedpilkistinoj partoprenantaj en la invita turniro estis mezlernejaninoj, la plej aĝa el ili havas 20 jarojn kaj la plej juna 14 jarojn. La 17-jara meza avanulo forta Sun Cuihuan, de la teamo de Shaanxi-provinco, lernas en supera mezlernejo. Same kiel piedpilkisto, ŝi posedas la teknikojn de trapenetra, transdona kaj alpuŝo de piedpilko kaj povas gol-ŝoti pilkon per ambaŭ piedoj kaj doni fortan baton per la pied-

dorso. En la turniro ŝi enpafis golon sep fojojn, kiuj okupis 55% de tiuj de la tuta teamo, tial ŝi estis elektita kiel la plej bona gol-ŝotistino de tiu turniro.

La golulo de la virina teamo de Guangdong-provinco estis Xiang Jieyi. Ŝi estas 18-jara svelta knabino kun du longaj brakoj kaj tre taŭgas por esti golulo. Antaŭe ŝi estis flugpilkistino. Ŝi rapide moviĝas, lerte elektas bonan starpozicion kaj alte saltas. En la tuta turniro ŝi perdis golon nur dufoje kaj estas golulo promesplena.

Kvankam la virina piedpilkado disvolviĝas en Ĉinio, tamen nombro da homoj, precipe la gepatroj de iuj knabinoj, ĝis nun ankoraŭ obstinas en malaprobo de tiu sporto. Ili opinias, ke la virino estas malforta kaj ne povas elteni tian intensan sporton. Iuj el ili eĉ malpermesas al siaj filinoj ludi piedpilkon.

Konsiderante ĝuste la fiziologiajn karakterojn de la virinoj, nun oni perfektigas iom post iom la regularon de la virina piedpilkado, ke ĝi racie diferencu de tiu por la vira. Ekz., por eviti vundadon oni difinis, ke la piedpilkistinoj devas porti kaŭĉukajn ŝuojn dum konkursado; kiam okazas puno per libera ŝoto, oni povas defendi sian bruston per ambaŭ manoj. Tiam eĉ la pilkotuŝo al iliaj korpoj ne estas kalkulata kiel malobservo de la regulo. La konkursa tempo por la virinoj daŭras 70 minutojn.

Nun la tuta socio dediĉas apartan atenton al tiu nove aperinta sporta branĉo kaj ankaŭ ĵurnaloj multe raportas pri tiu ludo. Ĉar la piedpilkado restas en la stato rudimenta, tial ankoraŭ ne fondiĝis ĉina landa virina piedpilka teamo.

*Antaŭ la golejo*



# Nekonataj helpemuloj

de HONG YING

**A**NTAŬ nelonge pluraj jur-naloj en Ĉinio diskonigis jenan okazaĵon: Filo de kampara fekaĵo kolektanto en Tonghua-gubernio, Jilin-provinco, sukcesis eniri, post la ekzameno, en la fakultaton pri inĝenierada meĥaniko de landfama Qinghua-universitato. La novaĵo pri tiu multesperiga junulo de malriĉa familio tuj disvastiĝis inter popolamasoj. Tamen, oni interesiĝis ne nur pri la novaĵo mem, sed eĉ multe pli. . .

La junulo, 20-jara, nomiĝas Qu Jifa. Lia patrino mortis de malsano, kiam li estis 11-jara, kaj lia familio implikiĝis en malriĉeco. En lia hejmo, krom lia patro, kiu estas fekaĵo-kolektanto, troviĝas ankaŭ lia 78-jara avo kaj 17-jara frato. Pro la kuracado al lia patrino kaj plie la malabundaj rikoltoj en la pasintaj kelkaj jaroj, lia familio ŝuldas al aliaj kelkcent juanojn. Ili vivas tre malfacile.

Informiĝinte, ke Qu Jifa studentigiĝis, la samvilaĝanoj ĝoje venis al lia hejmo por gratuli, tamen ili legis sur la vizaĝo de lia patro nekaŝeblan ĉagrenon. En tiu 4-membra familio nur la patro sola partoprenas en la kolektiva laboro. Nun la ŝuldo ankoraŭ ne estas likvidita, li ne havas ŝpareblan litajon por sia filo kaj rilate vestojn. . . ĉu li povus sendi lin en tia ĉifona vesto al universitato en la ĉefurbo Pekino?

La malfacilecon de Qu-familio bone vidis la loka popola registaro, kiu opiniis, ke estas honoro ne nur de la familio, sed ankaŭ de la tuta loĝantaro en la gubernio, ke filo de kamparano sukcesis eniri en Qinghua-universitaton, kaj la ŝtato devas doni al li monhelpon. Kun plezuro, kvazaŭ preparante doton por edziniĝonta filino, sekretario de la registara oficejo kondukis la junulon al butikoj kaj aĉetis por li litajojn, vestojn kaj aliajn vivbezonaĵojn. Antaŭ lia forveturo la produkta taĉmento donis al li 50 juanojn kiel lian poŝmonon. Fine li ĝojplene venis al la universitato. Laŭ lia hejma ekonomio, la lernejo lin stipendias per 22 juanoj ĉiumonate. Tiamaniere li komencis lerni kaj vivi same kiel siaj kunlernantoj.

Sajne, ni povus jam fini nian rakonton ĉi tie, sed fakte la helpo de la socio al tiu kamparana filo ankoraŭ daŭras. Nelonge post kiam li venis al la universitato, li ricevis leteron kun subskribo "paro da mezaĝuloj". En sia letero ili kuraĝigis lin diligente lerni por la prosperigo de Ĉinio. La letero legiĝas parte:

"Por mildigi vian malfacilecon en vivrimedoj, ni decidis doni al vi iom da nemenciinda helpo, nome, sendi al vi sumon da mono ĉiusezone. Ni ambaŭ estas ordinaraj ŝtataj funkciuloj. Ne miru pro nia propono, ni

postulas de vi nenion alian ol tion, ke vi bone lernu kaj fariĝu homo utila al la ŝtato."

Kun la letero ili alsendis 50 juanojn, por ke li aĉetu vestojn ĉe la sezonoŝanĝiĝo, kaj promesis sendi al li venontfoje alian sumon por lia hejmenveturo en la someraj ferioj.

La okazaĵo faris grandan sensation en la universitato. Oni admiris la noblan koron de la anonimaj geedzoj. La fakultato pri inĝenierada meĥaniko, kie lernas Qu Jifa, skribis al la redakcio de «Jilin Ribao» («Ĵurnalo de Jilin») de la koncerna provinco, petante helpon en la serĉo de tiu "paro da mezaĝuloj".

Post nelonge Qu ricevis de la nekonata paro la duan leteron, kiu legiĝas:

"Ni tre deziras informiĝi pri via lernado kaj via farto en la lasta tempo.

Pardonu, ke ni ne povis ĝustatempe sendi al vi la promesitan monon por via hejmenveturo, ĉar la poŝtoŝtato nun serĉas nin. Ne plu ĝenu la superajn instancojn per tiaj bagateloj, kamarado Jifa! Interhelpo ne devas okazi nur inter konatoj! Ni tion faris nur pro la konsidero, ke via familio havas malfacilon en la vivo. Ni volas nur helpi vin liberiĝi de tiuj embaraso, por ke vi trankvile plenumu vian lernadon en la universitato kaj post diplomitiĝo faru



kontribuon al la ŝtato kaj popolo per viaj fruktodonaj laboroj. Ni neniam deziris kaj deziros famiĝon per publikigo de niaj nomoj en ĵurnalo.”

La 29-an de oktobro pasintjare la ĵurnalo «Jilin Ribao» publikigis la dankleteron de Qu al la “paro da mezaĝuloj”. Li diris en sia letero: “. . . Kun la disvolviĝo de la agrikultura produktado, la vivo de mia familio iom pliboniĝis. Krome mi ricevas stipendion de la lernejo ĉiumonate. Kion mi bezonas nun ne estas materia helpo, sed kuraĝigo. La monon, kiun vi sendadis al mi, mi nepre redonos al vi, se eble. Se mi ne povus vin trovi, mi ĝin transdonus al la eduka instanco. Cetere, ne preparu plu al mi porvintran veston, kiun mi jam havas. Kiel ajn varma estas la vatita vesto, ĝi tamen estas malpli varma ol via koro por mi. . .”

La serĉo de la “paro da mezaĝuloj” ankoraŭ daŭris. La koncernaj departementoj en Tonghua-gubernio, kiuj partoprenis en la enketado, trovis, ke en la 7-a Mezlernejo de tiu gubernio estas tri paroj da mezaĝaj instruistoj, kiuj iam helpis studentojn per monrimedoj, sed neniuj el ili estis la serĉato. Poste, en alia mezlernejo oni trovis paron da mezaĝuloj, kiuj praktikis similan bonfaron, sed al studento, kiu diplomitiĝis el tiu lernejo. Estis vere malfacile trovi niajn anonimajn bonfarantojn inter tiom da fervoraj helpemuloj!

Ĝuste tiam la sindikato de Tonghua-gubernio trovis novan spuron: fabrik-direktoro en tiu gubernio kaj lia edzino — du altlernejaj diplomitoj de la 60-aj jaroj — ofte senbrue helpas tiujn, kiuj helpon bezonas. Ĉu ili estas niaj serĉatoj? Kiam oni



*Qu Jifa kaj lia kunlernanto legas leterojn el diversaj partoj de Ĉinio.*



*Qu Jifa (la unua de maldekstre) en eksperimentejo*

ilin demandis pri tio, ili neis kategorie. Oni akiris ilian manuskribon kaj konstatis, ke ĝi identiĝas kun tiu de la anonimaj leteroj. Nun la malkonfeso de tiu “paro da mezaĝuloj” ne plu efikis, tamen, ili firme postulis,

ke oni ne publikigu iliajn nomojn, kun jena klarigo: “Ni ŝatas la esperigan homon, sed ne vantantan monon. Nia sola deziro estas helpi la junulon, por ke li faru kontribuon por la moderniga konstruado de nia lando.”

# FORTO DE LA SEMO

de XIA YAN

Estas rakonto.

Oni demandas: Kio estas la plej forta en la mondo? La respondoj estas tre malsamaj. Iu respondas: elefanto, alia: leono, tria: diamanto<sup>1</sup>. Kian forton havas diamanto, kompreneble, neniuj scias.

Efektive, neniuj el la respondoj estas ĝusta. La plej forta en la mondo estas la semo. Ĝia forto estas simple neimagebla<sup>2</sup>.

Estas alia rakonto.

La kraniaj<sup>3</sup> ostoj de la homo interligiĝas tre kompakte<sup>4</sup>, ke fiziologoj kaj anatomiistoj neniel sukcesis ilin disigi sendifekte. Poste oni trovis bonan metodon por solvi la problemon: meti semojn en kranio, doni al ili taŭgan temperaturon kaj humidecon por ke ili ĝermu. Ĝermante, la semoj ekhavis timigan forton, kiu fine disigis sendifekte la ostojn, nedisigeblajn per ĉiu ajn mekanika forto.

Eble tio estas iom malfacile komprenebla pro neordinareco. Do mi citu alian ekzemplon. Ĉu vi vidis herbidon sub ŝtonpeco? Por vivi kaj ĝui la sunlumon, ĝi ĉiam obstine klopodas por sin elmontri, malgraŭ ke la ŝtonpeco estas peza kaj la ŝtonfendoj<sup>5</sup> mallarĝaj. Ĝiaj radikoj penetriĝas profunden en la teron kaj ĝia ĝermo plenforte supren-iras.

Tio estas nerezistebla forto, kiu eĉ povas renversi la ŝtonpecon.


Neniuj nomas herbidon fortulo, tamen ĝia forto estas senkompare granda en la mondo. Tiu forto estas vivforto ofte nerimarkebla. Se nur la vivo ekzistas, tiu forto sin montras. Neniuj povas malhelpi ĝin, ĉar ĝi estas forto elasta kaj obstina.

Anstataŭ en fekundan teron la vivhava semo falas en gru-

zon<sup>6</sup>, ĝi tamen ne deprimiĝas<sup>7</sup> nek ĝemspiras, ĉar ĝi kredas, ke ĝi povas sin hardi en malbona medio. Nur herbo, kiu ekhavas batalvolon tuj ĉe la komenco de sia vivo, estas forta. Kaj nur tia herbo rajtas ridi je tiuj floroj flegataj en vitraj domoj.

## Novaj vortoj

- 1 diamanto — la plej malmola juvelŝtono
- 2 ne-imag-ebla — ne-el-pens-ebla
- 3 kranio — la skeleto de la homa kapo
- 4 kompakte — dense kaj nedisiĝeme
- 5 ŝton-fendo — mallarĝa laŭlonga truo de ŝtono
- 6 gruzo — sablo miksitita kun malgrandaj ŝtonetoj
- 7 depremiĝi — malvigliĝi kaj senkuraĝiĝi



*Pino en rokfendo*



# Amikeco de Jugoslava Pentrismo

Fotoj de XIN YINGYI



Bogdan Jovanniĉ

Jugoslava pentristo Bogdan Jovanniĉ, kiu perdis la dekstran brakon, venis al Ĉinio en aprilo de 1982, kie li vojaĝis al multaj famaj montoj kaj riveroj, observis ĉinajn kutimojn kaj morojn kaj verkis centojn da pentraĵoj pri Ĉinio. Li ekspoziciis siajn 40 pentraĵojn en la Ĉina Belarta Domo de la 28-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro kaj ricevis laŭdojn de belartaj amatoroj.

Dum la eksponado li ĉiutage venis al la ekspoziciejo por kolekti opiniojn de rigardantoj kaj diskutis kun ili pri pentrarto.


Li donacis al la Ĉina Belarta Domo sian pentraĵon "Maizospikoj Pakitaj en Jurnalo".

En diskutado kun ĉinaj rigardantoj pri pentrarto





Kolektado de opinioj de ĉinaj rigardantoj



La pentraĵo donacita al la Ĉina Belarta Domo



La unua violonisto Attila Falvai

# HUNGARAJ



En prezentado





La dua violonisto Tamas Szabo



Aldisto Gabor Fias




Violonĉelisto Janos Devich

## MUZIKISTOJ EN ĈINIO

Fotoj de LAO BAI kaj YE RUIFU

La Kodaly-Kvarteto de Hungario vizitis Ĉinion de la 9-a ĝis la 11-a de novembro 1982. Ili ludis verkojn de Betoveno, Mozarto, Haydyn kaj Schumann en Pekino kaj ricevis varman laŭdon de ĉinaj aŭskultantoj.

La ĉina kaj hungara unuaj violonistoj Yang Bingxun (maldekstre) kaj Attila Falvay en intima interparolo







**Chen Xinren (la kvina dedekstre), konsilanto de la Ĉina Kultura Ministerio, kaj Zhao Feng (la tria dedekstre), konsilanto de la Centra Konservatorio, gratulas la hungarajn muzikistojn pro ilia sukceso en la prezentado.**



**Sur la Granda Muro**



## DU NOVELETOJ

Ilustritaj de CHEN ZHENXING

### Printempa nokto

de WU JINLIANG

“Se mi vidos alian, mi certe lin petos,” pensante Chen Jing levis la okulojn kaj rigardis palflavan lumon de la strateta lampo. Regis profunda nokto. Ĉie densiĝis la nigraj ombroj. “Fi, kia damninda biciklo!” ŝi vespiris senespere.

Eksonis tintilo de biciklo malantaŭ ŝi. Apenaŭ ŝi kriis por helpo, la biciklanta junulo jam rapide preterpasis.

Ha, la biciklanto revenis. Tamen ŝi maltrankviliĝis: “Kion li volas en tiel profunda nokto . . .”

“Ĉu vi vokis min?” la knabo desaltis de la biciklo.

“Oj, ne,” ŝi balbutis pro embaraso kaj singardemo.

“Ĉu difektiĝis via biciklo?” la knabo rigardis ŝin per duonridantaj okuloj.

“La ĉeno estas barita en la kovrilo,” murmuris ŝi kun mallevita kapo. Ekbrilis espero en ŝia koro.

“Do, ankaŭ mi havas nenian rimedon kontraŭ tio. Al mi mankas instrumentoj!” diris la knabo. Tuj malesperiĝis ŝi, aŭdinte tion.

“Ĉu malproksime estas via hejmo?”

“Mia hejmo?” ŝi hezitis respondi kaj subkonscie faris kel-

kajn paŝojn antaŭpuŝante la biciklon.

“Nu, maldekstre ekster la strateto estas biciklo-riparejo. Eble ĝi ankoraŭ laboras. Iru kaj rigardu, ĉu bone?” Tion dirante, la knabo surbicikliĝis kaj rapide kuris for.

“Ho, kia knabo!” ŝi preskaŭ

ekploris, “kiu riparejo ankoraŭ laboras en tiel profunda nokto. “Trompisto! Vin torturu terura sonĝo ĉi-nokte,” malbenis ŝi en la koro.

Elirinte el la strateto, Chen Jing pretervole rigardis maldekstren kaj vidis ke vere brilas lumo en dometo ĉe la trotuaro. Ŝi hezite haltis.



“Nu, bonvolu eniri, kamara-dino!” elpaŝis el la domo knabino ĉ. 20-jara.

“Aha! ja biciklo-riparejo!” tute sereniĝis ŝi, kvazaŭ ekheliĝus la ĉirkaŭaĵo.

La domo frontis al la strato. Ene estis fermita la pordo kondukanta al la interna ĉambro kaj en la ekstera ĉambro staris nur tablo, lito kaj biciklo. Iu junulo kaŭris ĉe la tablo kaj ion foliumis.

“Bonvolu eniri,” stariĝis la junulo kun ŝraŭbilo en la mano. “Bedaŭrinde ĉi tie malvaste.”

“Estas vi?” ekmiris Chen.

“Jes,” ekridetis la knabo. “Mi ja diris la veron. Ĉu mi povus vin trompi?” li palpebrumis per siaj saĝaj okuloj.

“Tuj post reveno de la noktoskipo mia frato vekis min el la dormo. Li diris ke estas io grava . . .” tion diris la knabino malantaŭ Chen, kvazaŭ mitralo.

“Pardonon, ke mi vin ĝenas,” Chen kun rideto dankis la knabinon.

“Ne gravas. Mia frato timas ke vi ne kuraĝos eniri kaj pro tio vekis min. Ho, vi ja estas timema, sed mi ne.” La vortoj de la knabino embarasis Chen.

Baldaŭ la veturilo estis riparita. “Kiom mi devas pagi?” demandis Chen kaj elkore volis ke la knabo multe postulu de ŝi.

“Kiom?” ekmiris la knabo kaj tuj ekridis: “Kvin juanojn,” etendante la manon olemakulitan.

“Kvin juanojn?! Centprocenta ĉantaĝo!” surpriziĝis Chen kaj malvolonte elprenis la monujon.

“Frato,” kriis la knabino kun tirata voĉo, “vi ŝercas jam ne en konvena tempo!” Ŝi kun ŝajniĝita kolero repuŝis lian manon kaj sin turnis al Chen: “Kamara-dino, ne koleru, li estas ŝercema. Ni ne estas profesiaj biciklo-riparistoj, kial ni akceptu vian monon?” ŝin konsolis la knabino kaj ruĝo ekkovris ŝiajn vangojn.

“Nu, mi ne plu ŝercu,” la kna-

bo frotis siajn manojn kaj ekridis, montrante siajn blankajn dentojn.

Survoje, la milda vento karesis la longajn harojn de Chen Jing, ke al ŝi estis agrable. Ŝajnis al ŝi, ke hodiaŭ la stratlampoj estas aparte brilaj kaj eĉ blindigaj, kaj la aero odoras freŝe kaj dolĉe.

Ho, ebria printempa nokto!

## Adiaŭo

de CUI YANJUN

“Kiel interese estus se iu propraokule vidus kondolencon aŭ funebron por si mem!” kun tia penso Wei Xian iris sur la vojo al sia hejmo sub la luno. Antaŭ dek minutoj, apud la fervojo, li renkontiĝis kun samvilaĝano Quanfu. Sed tiu montris surpriziĝon kaj timon. “Ĉu vi ne mortis? En via hejmo regas kaoso.” Tion dirinte per tremanta voĉo li haste envagiĝis, kvazaŭ li vidus fantomon. “Kial vi tiel timas min vivanton?” diris Wei Xian en la koro.

Antaŭ duonmonato li kune kun aĉetisto de silk-teksejo veturis aliloken pro laboro. Tie ilin trafis diluvo kaj estis forportitaj de la torento. Ĉar la aĉetisto bone sciis naĝi, sendube li sukcesis sin eldangeri kaj informis la vilaĝanojn pri la morto de Wei. Efektive Wei ne mortis — du boatistoj lin savis.

Kio okazas en la hejmo? Poregas la edzino kaj infanoj? Eble. Amikoj kaj kolegoj certe malĝo-

jas kaj portas funebron. Venis por kondolenco multaj homoj, kiuj plenigas la domon kaj korton. Kvankam la korto estas vasta, tamen ĝi plejparte estas okupita de florkronoj. Pensante tion, li sentis sin konsolita. Malgraŭ siaj eraroj en la laboro, li ĝuis prestiĝon, kiam li estis gvidanto de la produkta brigado. Nun li laboras kiel respondeculo de la komunuma entrepreno kaj havas vastan komunikiĝon, oni nature donas zorgon al lia morto. Quanfu iom similas al sia patro, la obstina maljunulo. Foje la brigado bezonis lignon, Wei do gvidis aron da homoj por elfosi la soforon malantaŭ la domo de Quanfu. La maljunulo flamiĝis. Demetinte la jakon kaj ĉirkaŭbrakumante la arbon per nudaj brakoj, li insultis ke li estas rabisto. La rememoro sentigis al li ŝtonon en la koro.

En la vilaĝo regis kvieteco. La arboj kaj konstruaĵoj dissemis siajn ombrojn surteren. La luno



brilis alte sur la ĉielo. Li puŝmalfermis la kortan pordon. Estis evidente, ke ĵus finiĝis la funebra kunveno, pri kio li sentis bedaŭron. Li haltis momenton ĉe la pordo kaj malrapide paŝis profunde en la korton. Trembrilis olelampo, antaŭ kiu staris florkronoj. Subite liajn okulojn frapis la portreto de li mem, kadrita per nigra silkru-bando. Ekblovis vento. Li ek-tremis de malvarmo. En tiu momento liaj pensoj zigzagis inter vivo kaj morto, bonfaro kaj malvirto, estinteco kaj estanteco. Konvulsiiis lia vizaĝo, kie cirklis sango kaj interkruciĝis nervoj. Li ĝemspiris profunde.



En la norda ĉambro singulte ploris lia edzino kaj en la orienta mallaŭte disputis liaj tri filoj. El la norda ĉambro ofte aŭdiĝis voĉoj de multaj virinoj: "Ne estu tiel malĝoja! Viaj larmoj lin ne revivigos!" "Viaj infanoj jam plenkreskis. Ĉu ili povus lasi vin senhelpa? Kaj krome estas ni samvilaĝanoj. Vin turnu al ni, se vi havos malfacilon." La voĉoj ŝajnis al li konataj kaj samtempe iom fremdaj. En la orienta ĉambro leviĝis arda disputo pri divido de liaj posedaĵoj.




Subite iu forte frapis tablon kaj ekmuĝis: "Ĉu estas dece disputi pri tio? Vi devas bone interkonsiliĝi kiel vivteni vian patrinon!" Tiu estis neniu alia ol la patro

de Quanfu. La muĝo konfuzis Wei Xian, ke li ne kuraĝas eniri. Sed starante antaŭ sia portreto, li senbrue eklarmis kvazaŭ por adiaŭi sian pasintecon.

\*\*\*\*\*



\*\*\*\*\*



WAN YU:

## ĈINA ALIGATORO

*Eĉ rano kuraĝas sidi sur la kapo de aligato.*

**E**STAS bone konata la krueleco de la krokodiloj, sed en la meza kaj malsupra basenoj de Jangzi-rivero, Ĉinio, vivas milda specio, nome la ĉina aligato (*Alligator*).

Antaŭ nelonge mi vizitis la bredejon de ĉinaj aligatoj en Anhui-provinco, orienta Ĉinio, kaj rigardis tiajn rarajn kvarpie-dajn rampulojn. Oni starigis en 1980 la bredejon kun pli ol 130 aligatoj por savi tiun specion el danĝero de pereco.


La ĉinaj aligatoj estas samtempuloj de la dinosaŭroj. Antaŭ 200 milionoj da jaroj ili ekvi-

vis sur la terglobo. Ili ne tiel facile postvivis la dinosaŭrojn, kiuj pereis antaŭ 70 milionoj da jaroj. Sed ilia nombro estas mizera. Nun en la mondo vivas 25 specioj de krokodiloj, kiuj vivas en la intertropika zono, escepte de la aligatoj, kiuj vivas en Misisipo de Usono kaj Jangzi-rivero de Ĉinio.

En la bredejo mi rigardis la aligatoran dormejon — rondan basenon kun insuleto formita el teraĵo en la centro. Sur la insulo kreskas arboj, floroj kaj herboj. Ĉio ĉi estas aranĝita favore al

la vivmaniero de la ĉinaj aligatoj. Sur la insulo sin trovas pli ol unu metron profunda kavo, destinita por ilia ripozo kaj vintrodormado. La bestoj enkaviĝas dum la lastaj tagoj de oktobro kaj elkaviĝas en la sekva aprilo aŭ majo. Ili plej viglas julie kaj aŭguste.

Poste mi vizitis la naĝejon de aligatoj, kie kuŝis en vico kvin basenoj kun totala areo de pli ol du trionoj da hektaro. En la centro de ĉiu baseno estas unu aŭ du malgrandaj insuloj, kie staras kelke da bambuaj tuboj servantaj kiel ventolejo. Sub



**Tarifo:** 1 internacia respondkuponon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: 1 intern. resp. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

\* Novfondita E-klubo "Malnovkastelo" dez. kor. kun ĉinoj pri ĉiuj temoj. Adreso: "Malnovkastelo", H.-Georg Kaiser, 7400 Alfenburg, Wenzelstr. 12, GDR.

\* 17-jara knabino vol. kor. esperante kun samideanoj el Ĉinio pri muziko, geografio kaj turismo. Mia adreso: Walentyna Długaszevska, Kepinska 2, 98-401 Wieruszow, woj. Kalisz, Pollando.

\* Jurij Petroŝeviĉ (32j, fraŭlo), ul. Gagarina, Pr. 2, d. 1/2, SU-703003 Samarkand, USSR, deziras korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj esperante, angle.

\* Ni studas en fervoja instituto kaj nia klubo deziras korespondi kun

E-organizacioj de fervojistoj kaj kun studentaj (junularaj) E-organizacioj. Skribu al Komitato TLKSJ KIA "EOS", Str. Kolmogorova, d. 66, urb. Sverdlovsk, USSR 620079.

\* S-ano Seoastiao Pereira — Rua Jose de Farias, 44-Mustardinha 50000 Recife/Brazilo, dez. kor. tutmonde kaj interŝanĝi p.m., b.k., revuojn, monerojn ktp. Respondu ĉiam.


\* Teresa Ziob, ul. H. Sawickiej 32, 42-600 Tarnowskie gory, Pollando, dez. kor.

\* Danuta Hercun (18-jara lernantino de gastronomia liceo), str. Kleczkowska 40/6, 50-227 Wro-





Ĉina aligato



Aligato kaj ĝiaj idoj

la tuboj estas iliaj kuŝejoj interligitaj per vojetoj, kien bredistoj povas iri por observi la bestojn. Mi sekvis brediston tien kaj vidis, ke kuŝas aligatoj kun fermitaj okuloj. La bredisto portis unu el ili eksteren, kio eble ĝenis ĝian dolĉan dormon. Ĝi kun ŝvelinta ventro larĝe malfermis siajn brilajn okulojn kaj faŭkon, montrante akrajn dentojn. “Hu — hu” ekmuĝis la besto, kvaŝaŭ lokomotivo ellasus gason. La vizitantoj ekterurigiĝis de tio kaj tuj retiriĝis. La bredisto diris kun rideto: “Kvankam

aspekte feroce, ĝi ne atakas homon la unua.”

Tia rampulo vivas en marĉo kaj prenas fiŝon, ranon kaj gastropodojn kiel sian nutraĵon. Ĝi manĝas ankaŭ anason kaj aliajn kortobirdojn. Kvankam ĝiaj okuloj estas ege miopaj, tamen ĝia aŭdado tre akra.

La ĉinaj aligatoj pariĝas en la unua tagdeko de junio kaj post unu monato demetas ovojn, ĉiufoje dekelkajn aŭ kelkdekajn, kiuj estas iom malpligrandaj sed pli longaj ol tiuj de la anasoj. La ĉinaj aligatoj ne kovas la ovojn, tamen iliaj idoj

mem povas eloviĝi post ĉ. 70 tagoj.

La ĉinaj aligatoj estas ĉefe protektataj en Ĉinio. En la kunveno kunvokita de UN en Kanado en 1973 por protekti sovaĝajn bestojn, la ĉina aligato estis difinita kiel unu el la raraj bestoj urĝe savendaj. Mia akompananto, biologia profesoro, diris al mi, ke la ĉina aligato estas valora ne nur ekonomie, sed pli grave en scienca esplorado. Kiel viva estaĵo, ĝi povas liveri pli multajn materialojn ol fosilioj por studi la antikvan geologion kaj evoluon de la estaĵoj.

claw, Pollando, deziras korespondi en Esperanto kun tutmondo pri moderna muziko, kaj aliaj temoj.

\* El la tuta mondo viajn leterojn, bildkartojn ni atendas okaze de nova kurso. Ni respondos al ĉiu! Adreso: Esperanto-grupo ĉe universitato, p.a. ASTA der Universitat, Welfengarten 1, D-3000 Hannover 1, FR. Germanio

\* Atentu! Geesperantistoj tutmondaj lernintaj Esperanton antaŭ 1948. VEK intencas registri ĉiujn malnovajn esperantistojn okaze de nia 100-jara jubileo 1987. Skribu nomon, naskiĝjaron, E-aligon kaj adreson al Julie Winter, Obere Str. 8 D-3549

Wolfhagen 1, sekretariino de VEK (Veterana Esperantista Klubo).

\* 26j. Margarita Hager, Via Gramsci 12, 00058 Santa Marinella, Italio, deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn.

. . . . .

ELDONEJO kaj LIBREJO SONORILO, nura oficiala Esperantolibrejo en Belgio. Belga Statgazeto 05-071962 No 3229, informas vin pri siaj eldonaĵoj:

*Universala skribo*: Manuel Halvelik. 128 p. 21 cm. Normlingva serio n-ro 2. Provo de unueca ortografio por ĉiuj lingvoj. Prezo: 150 BF.

*Gluafiŝo/Internacia lingvo Esperanto*: Jus aperis! Unika eldono! 7 cm × 16,6 cm. Minimuma mendokvanto: 10 ekz. Prezo: 250 BF po 10 ekz.

Ekde 5 ekz. “Eldonejo kaj Librejo Sonorilo” donas aŭtomate rabaton de 30%. En la netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendo sub la valoro de 1600 BF — 20%; por la mendoj super 1600 BF — 10%. Minimumaj sendokostoj: 70BF. Mendu rekte ĉe la eldonejo: ELS aspc, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk/Antwerpen, Belgio. Ni estas tre konataj dank’ al niaj plej malaltaj sendokostoj kaj vendoprezoj.


## BRILAJ ATINGOJ DE LA ORIENTA HAN-DINASTIO

de BA HONG

### REORDIGO KAJ DISVOLVO DE LA EKONOMIO

En la unuaj jaroj de la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.), la nombro de la loĝantaro, kompare kun tiu en la Okcidenta Han-dinastio (206 a. K.—24 p. K.), malkreskis de 59 ĝis 21 milionoj pro longa milito. Post sia surtroniĝo la imperiestro Guangwu plurfoje ordonis liberigi sklavojn. Kaj post li la imperiestroj Mingdi (58—75 p. K. en potenco) kaj Zhangdi (76—88 p. K. en potenco) ripete ordonis donaci aŭ pruntedoni al malriĉaj kamparanoj parton de la agroj posedataj de la registaro, iafoje eĉ kun semoj, agrikulturaj instrumentoj kaj la konsumota greno. Dank' al tio mildiĝis la socia krizo kaŭzita de la problemoj pri agraro kaj sklavoj en la lastaj jaroj de la

*Fera hakilo de la Orienta Han-dinastio*



Okcidenta Han-dinastio, la popolo ekhavis stabilan vivon kaj la ekonomio iom reprosperiĝis. Pro la disvolviĝo de fer-produktado, bov-plugo kaj irigacio, ĉiu agrikultura laborulo povis produkti meznombro 1 000 kilogramojn da greno ĉiujare, kaj la po-mu-a produktokvanto (unu mu-o=1/15 hektaro) atingis 50—100 kilogramojn, iafoje eĉ 250—350 kilogramojn por fekundaj parceloj. La nombro de la loĝantaro denove kreskis al pli ol 50 milionoj.


En la lastaj cent jaroj de la Orienta Han-dinastio, laŭvice surtroniĝis ok imperiestroj, kun aĝo de malpli ol 15 jaroj. Tiuj infanaj monarkoj estis facile superruzitaj de ambiciuloj kaj tio rezultigis uzurpadon fare de imperiestraj boparencoj. El tiuj imperiestroj tri mortis en infana aĝo, dum la ceteraj kvin forpelis la enpotencajn boparencojn sub helpo de eŭnukoj, kaj tio kvinfoje kaŭzis uzurpadon de eŭnukoj. La batalo inter imperiestraj boparencoj kaj eŭnukoj pro la regpotenco fine kondukis la ŝtaton en malluman periodon.

### EKONOMIAJ KAJ KULTURAJ RILATOJ INTER ĈINIO KAJ ALIAJ LANDOJ

La ĉina popolo deantikve havis amikajn rilatojn kun la popoloj de najbaraj kaj malproksimaj landoj. En la Orienta Han-dinastio tiuj rilatoj plifortiĝis. En 57 p. K. la 62-jara imperiestro Guangwu aranĝis ŝtatan bankedon honore al japana sendito kaj donacis al li oran sigelilon. Post pli ol 1 700 jaroj la sigelilo estis retrovita sur la insulo Sika de Fukuoka-ken, Japanio, ĝi estis grava atesto pri la amikeco inter la ĉina kaj japana popoloj en la pasintaj dumil jaroj.

Laŭ invito de sendito de Han-dinastio, en 67 p. K. du bonzoj de Hindio Kasyapa-matanga kaj Zhu Falan venis al la ĉefurbo Luoyang. La imperiestro Mingdi konstruigis por ili la templon Baima, la unuan templon de Ĉinio, kaj petis ilin ĉinigi la Patra-foliajn sutrojn, kiujn ili alportis. Depost tiam budhismo disvolviĝis en Ĉinio.

*Frotpresaĵo de reliefoj pri ferforĝado en la Orienta Han-dinastio*





En la Okcidenta Han-dinastio Ĉinio jam komencis eksporti siajn silkajojn al la okcidentaj landoj, kaj en la Orienta Han-dinastio tiu komerco fariĝis ankoraŭ pli prospera. Por monopoligi la merkatojn de silkajoj, Persio (Irano) ĉiamaniere malhelpis la komunikigon inter Han-dinastio kaj la Romana Imperio. En 97 p. K. Gan Ying, sendito de la Orienta Han-dinastio al la Romana Imperio, vizitis multajn lokojn de la okcidenta Azio. Ĉe la Persa Golfo li informiĝis, ke en transveturado de la maro oni renkontos nevenkeblajn malfacilojn, tial li ne atingis la Romanan Imperion. Tamen, ĉinaj silkajoj estis ĉiam tre ŝatataj en Romio. Fine en 166 p. K. la sendito de la romana imperiestro Marcus A. Antonius venis al Ĉinio, kunportante eburon, rinocerajn kornojn kaj ĥeloniajn ŝelojn kiel donacojn al la imperiestro de Han-dinastio.

### LA INVENTO DE PAPERERO

Antaŭ la apero de papero, en la dinastioj Shang kaj Okcidenta Zhou (la 16-a—la 8-a jc. a. K.), oni gravuris ideografiajn sur testudŝeloj aŭ brutaj skapoloj, ankaŭ sur argilo, per kiu oni muldis bronzajn surskribaĵojn. Kun la disvolviĝo de la socio, oni komencis skribi sur bambuaj aŭ lignaj platoj en la periodoj de

Printempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj (770—221 a. K.). Por unu artikolo oni bezonis grandan nombron da tiaj platoj, kaj post finskribo oni ilin ligis per ŝnuro. Dum la regado de la imperiestro Wudi, kortegano Dongfang Shuo foje prezentis al la imperiestro artikolon, por ĝin skribi li foruzis 3 000 bambuajn platojn, kiujn du fortuloj portis en la palacon. Poste iuj skribis sur silkajoj, kvankam pli malpezaj kaj oportunaj ol bambuaj kaj lignaj platoj, tamen multekostaj. Escepte de aristokratoj kaj alt-ranguloj, ordinaraj homoj ne povis pagi por tio.

Dum la regado de la imperiestro Hedi, oficisto Cai Lun (?—121 p. K.) faris el ĉifonoj, arboŝeloj kaj eluzitaj fiŝretoj malpezan kaj malmultekostan paperon por skribo kaj resumis la tutan procedaron de paper-farado.

Oriente de la nuna urbo Xi'an, ĉinaj arkeologoj elterigis paperon el kanabaj fibroj, kiu, laŭ ilia konstato, estis farita 200 jarojn pli frue ol tiu de Cai Lun kaj estas la plej frua papero ĝis nun trovita en Ĉinio. Tamen, limigite de la tiamaj historiaj kondiĉoj, la invento estis neglektita anstataŭ disvastigita.

Post ĉirkaŭ 500 jaroj la procedaro de paper-farado de Cai Lun



Statuo de Zhang Heng

estis enkondukita en Japanion, post pli ol 600 jaroj en Arabion kaj Eŭropon kaj post pli ol 1 500 jaroj en Amerikon.


### ZHANG HENG KAJ LIA SISMOGRAFO

Zhang Heng (78-139 p. K.) estis fama sciencisto en la antikva Ĉinio. Dum la regado de la imperiestro Andi li funkciis kiel



Argila figuro de popola kantisto en la Orienta Han-dinastio

Modelo de la sismografo





Portreto de Hua Tuo

kortega astronomo. Post longa observado kaj esplorado li konstatis, ke la terglobo estas ronda kaj la luno lumas nur en reflektado de la sunradioj, tiel ke oni povas vidi la plenlunon, kiam ĝi frontas al la suno, sed ĝi malaperas el la vido, kiam ĝi turnas la dorson al la suno. Li la unua en Ĉinio donis sciencan klarigon pri la suna kaj luna eklipsoj laŭ la ŝanĝiganta dispozicio de la suno, luno kaj tero.

Surbaze de sia astronomia studo li verkis libron titolitan "Ling Xian". "Ling" estas la nomo de lia observatorio, kiu situas en la nuna gubernio Yanshi, Henan-provinco, kaj "Xian" signifas naturajn leĝojn. En la libro li asertis, ke ronda estas la ĉielo, kiu envolvas la teron, kiel ovoŝelo ovoflavon. Li desegnis la unuan stelmapon en Ĉinio, kiu montris, ke oni povas vidi 2 500 stelojn en la regiono Luoyang. Tiu nombro preskaŭ identiĝas kun la statistiko de modernaj astronomoj, kiuj konstatis, ke 2 500—3 000 steloj estas okule videblaj samloke kaj samtempe.

Tiutempe ofte okazis tertremoj, kiujn oni rigardis kiel malbonajn aŭgurojn. Li ne konsentis kun ili. Post kiam li konsciencie studis la registritajn tertre-

majn fenomenojn, li fine inventis aparaton por observi kaj registri tertremojn — sismografon.

La aparato estis farita el bronzo en formo de vin-urno, kun ok drakaj figuroj kontraŭ ok malsamaj direktoj, ĉiu kun unu bronza globeto en la buŝo. Ok bronza bufoj kaŭris sube, ĉiu kun la buŝo malfermita respektive kontraŭ tiu de la drakaj figuroj. Interne de la aparato vertikale staris bronza stango supre dika kaj malsupre maldika, kiu ligiĝis al la ok drakaj kapoj per ok krankoj respektive. Kiam okazis tertremo, la stango, influate de tertremaj ondoj, kliniĝis en la direkto, kie okazis la tertremo, kaj premis la malsupran finon de la koncerna kranko, kiu siavice ektiris la drakan kapon kaj — "tan!" — faligis la globeton en la buŝon de la bronza bufo, alarmante pri la okazinta tertremo.

Tagon de februaro, 138 p. K., la drako direktita okcidenten subite malfermis la buŝon kaj eligis la globeton. Laŭ la projekto de Zhang Heng, tio ja montris, ke okcidente okazis tertremo. Sed tiun tagon en Luoyang estis nenia signo, nek informo pri la okazinta tertremo. Tial oni opiniis, ke lia sismografo estas nenio alia ol simpla trompaĵo. Post kelkaj tagoj kuriero fluge alrajdis al la kortego kun la raporto, ke granda tertremo okazis ĉe Jincheng kaj Longxi (en la nuna Gansu-provinco) je pli ol 500 kilometroj for de Luoyang.

Krom sia studo pri astroj, Zhang Heng kreis ankaŭ "Bronzan Ventbirdon", "Voj-mezuran Tambur-ĉaron", "Kompasan Ĉaron" ktp. La Bronza Ventbirdo, simila al la eŭropa ventkoko kreita en la 12-a jarcento, estis la plej frua instrumento en la

mondo por montri la direkton de vento, kaj la struktura principo de la Voj-mezura Tambur-ĉaro estis sama kun tiu de la nuna kilometromezurilo de aŭto.

## HUA TUO, INICIATINTO DE LA KIRURGIO DE LA TRADICIA ĈINA MEDICINO

Kiam Hua Tuo (? — 208 p. K.) estis juna, li dufoje rifuzis akcepti ŝtatan oficon kaj preferis esti ordinara kuracisto. Li havis grandan sukceson en la diagnozo kaj kuracado de internaj malsanoj, sed liaj atingoj en la kampo de kirurgio estis aparte brilaj. Li iniciatis tutkorpan anestezon por kirurgia operacio kaj la unua en la mondo praktikis ĝin. Antaŭ ol fari operacion li prenigis al la paciento narkotajn nomatan "Mafeisan". Kiam tiu perdis konscion, li faris al la paciento tumor-fortranĉon, cezaran akuŝigon, partan ablacion kaj kunligon de la intesto ktp. Legendo diris, ke foje boatisto suferis de terura ventrodoloro. Hua Tuo konstatis, post diagnozo, ke lia lieno estas putra, ĝin oni devas fortranĉi tuj. La paciento konsentis, prenis narkotajn kaj baldaŭ endormiĝis. Hua Tuo malfermis la abdomenon kaj fortranĉis al li la malsanan lienon, kunkudris la tranĉvundon kaj ĝin ŝmiris per muskolokreskiga unĝvento. Post 4-5 tagoj la vundo cikatriĝis, kaj la boatisto tute resaniĝis post ĉirkaŭ unu monato.

Hua Tuo donis grandan atenton al la korpa ekzercado. Por protekti la sanon kaj fortigi la korpon, li iniciatis gimnastikon "Ludoj de Kvin Bestoj", kiu imitas la movojn de tigo, cervo, urso, simio kaj birdo, por ekzerci la homajn korpopartojn. Hodiaŭ ankoraŭ multaj ĉinoj ekzercas sian korpon per tiu gimnastiko.



## *Ekonomia kunlaboro inter latinamerikaj landoj*

**L**A rimarkindaj atingoj de la ekonomia kunlaboro inter latinamerikaj landoj akcelis la disvolviĝon de la nacia ekonomio de la landoj de la tria mondo kaj la starigon de nova internacia ekonomia ordo.

Latinameriko havas vastan teron kaj abundajn riĉfontojn favorajn al disvolvo de ekonomio. En la sesa kaj sepa jardekoj, la procentaĵo de ekonomia kresko de latinamerikaj landoj atingis respektive 5.7% kaj 5.8%, pli alte ol tiuflanka meznombre procentaĵo de la landoj de la tria mondo. En la meza periodo de la sepdekaj jaroj, la industria produktovaloro de Latinameriko estis duoble pli alta ol ĝia agrikultura produktovaloro kaj la industrio de Brazilo, Meksikio kaj Argentino jam atingis rimarkindan nivelon. Tamen, pro la regado de la neracia malnova internacia ekonomia ordo, nekomplete ŝanĝiĝis la unusola ekonomia strukturo formita en la koloniisma epoko kaj la ekonomia disvolviĝo estis daŭre ĝenata de la evoluantaj landoj kaj krome la ekonomia krizo en la kapitalisma mondo ege damaĝis la latinamerikajn landojn. Pro tio, antaŭlonge ili deziregis ŝanĝi la malnovan internacian ekonomian strukturon. Ili staras por tio, ke la landoj de la tria mondo helpu unu alian,

praktiku ekonomian kunlaboron, disvolvu la nacian ekonomion kaj sin liberigu de la dependo de evoluantaj landoj por starigi novan internacian ekonomian ordon.

La ekonomia kunlaboro inter latinamerikaj landoj estas duflanka aŭ plurflanka. Por plurflanka kunlaboro oni fondis interregionajn ekonomiajn organizojn por ĉefe fari komercon kaj praktiki ĉiuflankan kunlaboron, kunlaborajn organizojn por ke pluraj landoj kune ekspluatu riĉfontojn, organizojn el landoj produktantaj kaj eksportantaj krudmaterialojn por stabiligi la prezojn de eksportaĵoj kaj plibonigi komercajn kondiĉojn, kaj aliajn ekonomiajn kunlaborajn organizojn.

La praktiko ekde la komenco de la sesa jardeko pruvis, ke la ekonomia kunlaboro inter latinamerikaj landoj akcelis la interregionan komercon, la ekonomian disvolviĝon kaj la fondon de nova internacia ekonomia ordo.

Favora komerco estas grava parto de la ekonomia kunlaboro inter latinamerikaj landoj. Dank' al malaltigo de dogano kaj nuligo de limigoj en komerco, rapide kreskis la komerca sumo de latinamerikaj landoj. En sia interna komerco la Lati-

namerika Liberkomerca Asocio malaltigis kaj nuligis doganon por ĉ. 20 000 varspecoj, tiel ke la komerca sumo de la membrolandoj leviĝis de 300 milionoj da dolaroj en 1960 al pli ol ses miliardoj da dolaroj en 1980. En sia interna komerco la Anda Grupo malmultigis doganon meznombro je 90% por du trionoj de la produktaĵoj, kaj dank' al tio la komerca sumo 14-obliĝis en 10 jaroj. Ankaŭ rimarkindaj ŝanĝoj okazis al varspecoj. En 1969, kiam la grupo fondiĝis, duono el la varoj estis tradicia por la interna komerco, sed hodiaŭ netradiciaj varoj konsistigas 88%. Nun pli ol duono de la importitaj maŝinoj de latinamerikaj landoj dependas de interna komerco.

Fondi kombinaton estas alia rimedo de ekonomia kunlaboro. Latinamerikaj landoj laŭ sia situo kaj ekonomia nivelo organizis malsamajn interregionajn ekonomiajn grupojn, kiuj per komerco akcelas industrian disvolviĝon. La Anda Grupo faris planojn por disvolvi la industriojn de petrolkemio, aŭtofarado, metal-prilaboro kaj maŝinfarado. Laŭ plano disvolvi interregionan industrian la Kariba Komunumo kune konstruis la industriojn de aluminio kaj cemento. Senĉese aperas kaj gran-

diĝas kompanioj kune administrataj de du aŭ pli multaj latinamerikaj landoj. En la sepdekaj jaroj troviĝis pli ol 170 tiaj kompanioj. Tio estis signifoplena disvolviĝo de interregiona ekonomia kunlaboro al produktado.

La komuna ekspluatado de naturaj riĉfontoj multe akcelas la ekonomian disvolviĝon de latinamerikaj landoj. Por ekspluati Amazonon, plibonigi navigajn kondiĉojn kaj vigligi komercon, ok landoj en la baseno de Amazono subskribis en 1978 la Amazonan Kunlaboran Kontrakton. La rivero La-Plato en suda Ameriko havas tre abundajn akvajn riĉfontojn. Por racie utiligi ilin kaj redukti la petrolimporton, la landoj trafuitaj de la rivero kune konstruas elektrejojn, inter kiuj hidroelektrejo konstruata kunlabore de Brazilo kaj Paragvajo estos unu el la plej grandaj en la mondo kaj ĉiujare donos 12.6 milionojn da kilovattoj da elektro.

Interhelpo estas alia grava flanko de ekonomia kunlaboro. Meksikio kaj Venezuelo, ĉefaj petrollandoj de Latinameriko, donis ekonomian helpon al petrolmankaj landoj. En 1980 tiuj du landoj decidis favore liveri petrolon al naŭ mezamerikaj kaj karibaj landoj kaj difini 30% de la liverata petrolo kiel malaltinterezan prunton al ili por helpi ilin solvi financajn malfacilojn. Tio efike akcelis la unuiĝon inter la landoj petrolproduktaj kaj petrolmankaj kaj estas laŭdata de la koncernaj latinamerikaj landoj.

Dum longa tempo eksterlandaj monopolaj kapitalistoj senbride prirabis la agrikulturajn kaj minejajn riĉfontojn de La-

tinameriko kaj intencis krei "landon en lando per la translanda korporacio. Por defendi siajn suverenecon kaj ekonomiajn rajtojn, la latinamerikaj landoj ekpraktikis politikon limigi la korporacion kaj sin turnis al kunagado. Frue en 1970 la Anda Grupo aprobis la "Komunajn Regulojn pri Ekstera Kapitalo", kiu faris difinojn pri investado de eksterlandaj entreprenoj, ilia forportebla profito kaj reinvestado de ilia profito. En la "Projekto de Leĝo por Gvidi la Agadon de la Translanda Korporacio" la latinamerika ekonomia sistemo klare montris, ke la translanda korporacio devas respekti la suverenecon de la koncerna lando, sed ne interveni en ĝiajn internajn aferojn. Samkiel aliaj disvolviĝantaj landoj, la latinamerikaj landoj estis viktimoj de la malnova internacia ekonomia sistemo. En la sesa kaj sepa jardekoj ili prezentis serion da proponoj por starigi novan internacian ekonomian ordon. La "Deklaro pri Starigo de Nova Internacia Ekonomia Ordo", "Programo de Agado" kaj "Ĉarto pri Ekonomiaj Rajtoj kaj Devoj de Ĉiuj Nacioj", aprobitaj de la Ĝenerala Asembleo de UN, estis ellaboritaj dank' al la partopreno kaj proponado de latinamerikaj landoj. La tri dokumentoj jam fariĝis programaj dokumentoj de la tria mondo por starigi novan internacian ekonomian ordon. La unuiĝo kaj kunlaboro inter latinamerikaj landoj pli kaj pli manifestas sian forton kaj efikon en akcelo de interparolo inter la nordo kaj la sudo.

Estas esperplena la ekonomia kunlaboro inter latinamerikaj landoj.

## Enciklopedieto de Ĉinio

### TRADICIAJ FESTOJ

#### LA KVINA DE LA KVINA MONATO

La festo okazas en la kvina tago de la kvina monato laŭ la ĉina luna kalendaro.

En tiu tago ĉinoj remkonkursas en drakaj boatoj kaj manĝas *zongzi*-ojn. Estas legendo: En la periodo Printempo kaj Aŭtuno antaŭ pli ol 2 000 jaroj la granda ĉina patriota poeto Qu Yuan sin dronigis en rivero en la kvina tago de la kvina monato pro sia malkontento pri la malluma regado, senforteco por savi la patrolandon el perejo kaj neebleco efektivi siajn politikajn proponojn. La tieaj loĝantoj kun granda malĝojo remis en boatoj por elakvigi lian korpon. Poste en tiu tago oni ĉiam remis en drakaj boatoj por konsoli lian animon. Kaj poste iom post iom formiĝis la kutimo de aranĝo de remkonkurso en tiu tago.

Frumatene de tiu tago oni ĝoje veturis de diversaj lokoj al konkursejo per ligna boato kun pintaj kaj suprenlevitaj drakkapo kaj drakvosto. Je la komenco de la konkurso oni gongas kaj tamburas sur la bordoj, tiam la konkursantoj per sia tuta forto antaŭenmovas la boaton kiel eble plej rapide kaj rigardantoj ĝojkrias por kuraĝigi ilin.

Legendo diras ankaŭ, ke post la morto de Qu Yuan ĉiujare lia edzino ĵetis manĝaĵon en la riveron en tiu tago por kulturi lin. Foje ŝi songis, ke ŝia edzo diras al ŝi: "Drako kaptis ĉiujn manĝaĵojn, kiujn vi donis al mi. Ĝi nenion timas, krom bambuo kaj diverskoloraj silkaj fadenoj." Poste oni preparas manĝaĵon el glueca rizo entenata en bambuaj folioj kaj ĉirkaŭligita per diverskoloraj silkaj fadenoj por rememorigi pri la poeto.



## E ĜINIO (2)

Tio estas nomata *zongzi-o*, kiu poste fariĝis tradicia manĝaĵo por tiu festo.

### LA AŬTUNMEZA FESTO

La ĉinoj festas sian Aŭtunmezan Feston en la 15-a tago de la oka monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Lun-kuko estas ilia fest-manĝaĵo.

Legendo diras: En la dekkvara jarcento la ĉina popolo decidis ekribeli kontraŭ la kruela reganto je la 15-a de la oka monato lunkalendaro. Ili ŝovis en lun-kukon paperslipon kun skribita dato de ribelo por ĝin transdoni unu al alia. Poste oni ekhavis la kutimon manĝi lun-kukojn. Nun la kutimo simbolas harmonian kuneston de la tuta familio.

Estas multaj specoj de lun-kukoj. Ili kun kernoj de juglandoj, pinaj nuksoj, akvomelonaj semoj kaj sekigitaj fruktopecoj ene, aŭ kun jujub-pulpo, sukerita fazeola pasto

kaj hakita ŝinko interne, estas bakitaj en tegajo el tritika faruno knedita kun oleo kaj sukero. La kukoj, ore flavaj, havas diversajn formojn, plej ofte rondan. Oni ŝatas ilin pro ilia delikateco kaj dolĉeco. Oni aĉetas ilin ankaŭ kiel festodonacon al siaj parencoj aŭ amikoj.

Ofte estas bona vetero en mezaŭtuno. Vespere sub la hela luno kunsidas la tuta familio ĉirkaŭ la tablo por manĝi lun-kukojn kaj rigardi la lunon ĝis profunda nokto. La festo nature vekas nostalgion ĉe tiuj, kiuj loĝas for de sia hejmloko.

Antaŭe tiuvespere en iuj lokoj oni metis fruktojn kaj lun-kukojn sur tablojn en sia korto kaj bruligis incenson kaj lumigis kandelojn ĉe lunleviĝo por kulti la dion de la luno.

### LA FESTO DUOBLE NAŬA

La festo estas celebrata en la 9-a tago de la naŭa monato laŭ la ĉina luna kalendaro.

Oni havas la feston en aŭtuno, — ora rikolta sezono. Post laborado oni ĝoje sin amuzas per monto-grimpado dum la festotago.

Pri la festo cirkulas legendo: En la Orienta Han-dinastio (25 p.K. — 220 p.K.) feo Fei Changfang diris al sia disĉiplo Huan Jing: “Vian familion trafos malfeliĉo je la 9-a de la naŭa monato. En tiu tago ĉiu el via familio dorse portu sakon kun kornusfruktoj al monto por tie trinki krizanteman vinon, tiam la malfeliĉo estos evitita.” La familianoj de Huan faris tion laŭ lia propono. Reveninte hejmen, ili vidis, ke mortis ĉiuj iliaj brutoj. Poste, je la 9-a de la naŭa monato ĉiujare oni montogrimpas por sia bono. Tio ebligas al la festantoj ĝui pejzaĝojn kaj spiri freŝan aeron.

Kornuso estas sovaĝa planto kaj ĝiaj fruktoj servas kiel medikamento. Estas interesa aktivado kolekti kornusfruktojn dum la festo.

Laŭ la malnova moro, en la festotago la gepatroj devas regali sian edziniĝintan filinon per vaporumita farunaĵo, tial oni nomas tiun feston ankaŭ Festo de Filino. Estas du specoj de tia manĝaĵo: unu farita el sukerita faruno en du aŭ tri tavoloj, kun malgrandaj fruktopecoj en la interno; alia surhavanta jujubojn, senseligitajn kaŝtanojn aŭ kratagfruktojn. Se la filino ne povas ĉeesti, tio malĝojigas ŝiajn gepatrojn kaj gefratojn.

*Qu Yuan (Ornama pentraĵo)*  
de DING TONGCHENG



# Datong — antikva urbo de Ĉinio

de XUE SHENG

**V**ETURINTE de Pekino okcidenten ĉ. sep horojn per trajno oni atingas la faman antikvan urbon Datong en la norda parto de Shanxi-provinco.

Datong sin trovas apud la Granda Muro. Ĝi, ĉirkaŭata de montoj en tri flankoj kaj preterpasata de rivero en la sudo, estas de antikveco grava fortreso en norda Ĉinio. De 398 p.K. ĝi funkciis kiel ĉefurbo de la Norda Wei-dinastio dum 96 jaroj. Post la 11-a jarcento ĝi estis vicĉefurbo de la dinastioj Liao kaj Jin. En la 14-a jarcento la unua imperiestro de Ming-dinastio Zhu Yuanzhang feŭdis ĝin al sia filo Zhu Gui. Ĝi altiras al si pli kaj pli multajn eksterlandajn turistojn pro sia longa historio kaj multaj kulturaj restaĵoj.

La mondfama Yungang-ŝtonkavernaro situas en la suda piedo de la monto Wuzhou 16 kilometrojn okcidente de la urbo. Ĝi, fosita laŭ la montodeklivo, etendiĝas unu kilometron de oriente okcidenten. En ĝiaj 53 kavernoj konserviĝas pli ol 51 000 ŝtonaj statuoj. Yungang-ŝtonkavernaro, Mogao-ŝtonkavernaro en Dunhuang-gubernio, Gansu-provinco, kaj Longmen-ŝtonkavernaro en Luoyang, Henan-provinco, estas listigitaj kiel tri grandaj trezorejoj de la antikva arto de Ĉinio.

Yungang-ŝtonkavernaro komencis esti konstruata en 460 p. K., en la Norda Wei-dinastio. Tiam por penti pri la krimo de

sia patro, kiu aboliciis budhismon, la imperiestro Wencheng de la norda Wei-dinastio denove kultis ĝin. Li ordonis konstrui templojn en diversaj lokoj kaj komisiis al eminenta bonzo Tanyao respondi pri la konstruado de la ŝtonkavernaro. Ĝiaj ĉefaj kavernoj plejparte finkonstruiĝis antaŭ la jaro 494 p. K., kiam la Norda Wei-dinastio prenis Luoyang kiel sian novan ĉefurbon, kaj la konstruado de malgrandaj kavernoj daŭris ĝis 524 p. K. La konstruadon partoprenis 40 000 metiartistoj kaj aliaj laborantoj.


Inter la tieaj budhostatuoj la plej granda altas 17 metrojn, kiu sidas en la centro de la kvina kaverno, kun la kruroj interkrucitaj, sur kiuj povas stari 120 personoj. La plej malgranda budhostatuo havas altecon nur de kelkaj centimetroj. Sur la froko de budhostatuo en la 18-a kaverno skulptiĝis eĉ ĉ. mil

malgrandaj budhostatuoj. La pli ol 50 000 statuoj en la ŝtonkavernaro estas versimilaj kaj diversopozaj.


En la ŝtonkavernaro Yungang la sesa kaverno estas la plej bela kaj enhavoriĉa. Antaŭ la kaverno staras kvaretaĝa turo tegmentita per verdaj tegoloj kaj kun duoblaj tegmentrandoj. En la centro de la kaverno staras duetaĝa kvadrata pagodo kun budhostatuoj ene. Ĝi, alta je 16 metroj, tuŝas la plafonon de la kaverno. La kolonoj de la pagodo kaj muroj de la kaverno estas plenaj de freŝkoloraj gravuraĵoj. La plej okulfrapa estas relieffaro el 33 pecoj, kiu vivece prezentas la procedon de naskiĝo de Ŝakjamunio ĝis ties budhiĝo.

La konstruaĵoj, skulptitaj budhostatuoj, vestoj, muzikiloj kaj dancozoj en la ŝtonkavernaro estas riĉaj materialoj ne nur por studi la ĉinan antikvan kulturon kaj arton, sed ankaŭ por studi


*La templo Shanhua en Datong*







*Niĉo sur la okcidenta muro en la 11-a kaverno*



*La ŝtonkavernaro Yungang*

la kulturalan interŝanĝon inter Ĉinio kaj aliaj landoj en la fruaj jaroj. Laŭdire, por konstrui la ŝtonkavernaron oni siatempe venigis metiartistojn el Shandong, kiuj heredis la tradician gravurarton de Han-dinastio antaŭ la tria jarcento, tiujn el Dunhuang, kiuj alportis gandharan arton enkondukitan el Hindio, kaj bonzojn el Srilanko, kiuj alportis portreton de Ŝakjamunio. La 13 metrojn alta budhostatuo en la 20-a kaverno bone enkorpigas la interŝanĝon inter malsamaj artaj skoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj. La statuo havas rektan nazon kaj platan frunton, kio evidente montras la influon de la gandhara arto, dum ĝia diketa korpo kaj vestofaldoj montras la tradician gravurarton de Han-dinastio. Tiuj artoj harmonie kunfandiĝis sur la statuo kaj kreis belecon de aparta gusto.

La temploj Shanhua kaj Huayan en la urbo estas antikva konstruaĵaro de Ĉinio. La templo Shanhua estis konstruita en Jin-dinastio en la 12-a jarcento. En ĝi imponas altaj domoj en strikta aranĝo. La templo Huayan servis kiel sutrokonservejo kaj pre-

ĝejo de la regantoj de Liao-dinastio en la 11-a jarcento. Poste ĝia granda parto ruiniĝis pro militado kaj restis nur unu halo. En ĝi bonorde konserviĝas 31 statuoj de Liao-dinastio, inter kiuj estas predikanta Tathagata, budhogardantaj kvar Ĉielaj Reĝoj kaj predikoaŭskultantaj bodisatvoj kaj liaj disĉiploj, ĉiuj kun viveca mieno kaj natura pozo. Rompinte la rutinojn en religia plastiko la metiartistoj de Liao-dinastio donis al la statuoj klaran personecon kaj temperamenton, kaj pro tio ili fariĝis valoraĵoj en la ĉina antikva argila skulpturo.

La alia halo — Mahavira Halo en la templo Huayan estis rekonstruita en Jin-dinastio. Ĝi kun larĝeco de 53 metroj kaj profundeco de 29 metroj estas unu el la du plej grandaj budhismaj haloj de Ĉinio (la alia estas halo de la templo Fengguo en Yixian-gubernio de Liaoning-provinco). La tuta konstruaĵo estas interligita per tenonoj kaj mortezoj. Post pli ol 800 jaroj ĝi estas ankoraŭ ne kliniĝinta kaj pluvimuna, kio montris altan nivelon de la ĉina ligna arkitekturo. Ĉiuj kolonoj en la

halo estas ornamitaj per koloraj desegnaĵoj. Kaj ĝia plafono el pli ol 970 pecoj surhavas desegnojn pri drakoj, feniksoj, floroj, herboj kaj sanskrita skribaĵo.

En la urbo Datong troviĝas la plej granda naŭdraka ekranmuro de Ĉinio. Ĝi 45 metrojn longa, 8 metrojn alta kaj du metrojn dika estis surface masonita per specialaj kvinkoloraj brikoj. La naŭ brilkoloraj drakoj havas eksterordinaran formon, iuj flugas en nubaro kaj aliaj ludas globon. Legendo diras, ke ĝi estis ekranmuro antaŭ la domo de la princo Zhu Gui en Ming-dinastio. La domo antaŭlonge jam ruiniĝis de incendio, tamen la muro staras sendifekte de pli ol 600 jaroj.

Datong estas ne nur historia kultura urbo, sed ankaŭ fama karboproduktejo de Ĉinio. Laŭ prospektorado la areo de ĝiaj karbokampoj atingis 2 200 kvadratajn kilometrojn kaj la karbotavoloj dikas je pli ol 40 metroj. Nun Datong estas unu el la gravaj bazoj de bonkvalita karbo de Ĉinio kaj ankaŭ nova industria urbo kun entreprenoj elektra, metalurgia, maŝina, kemia, tekstila kaj manĝaĵa.

# REVIVIĜO DE ANTIKVAJ SUTROJ

de ZHANG CHONGFA

**P**OST pli ol 800 jaroj restas sendifekta la altvalora kolekto de antikvaj sutroj de Ĉinio "Zhao Cheng Jin Zang". Tamen oni travivis neordinarajn jarojn en ĝiaj malkovrado kaj konservado.

## ORIGINALA KOLEKTO DE BUDHISMAJ SUTROJ DE LA MONDO

"Zhao Cheng Jin Zang", la plej kompleta kolekto de budhismaj sutroj en la mondo, en pli ol 7 000 volumoj, enhavas la sutrojn, regulojn kaj traktatojn de budhismo. En ĝi estas troveblaj kopioj kaj tradukoj de sutroj antaŭ longe jam perditaj en Hindio, la naskiĝlando de budhismo.

El tiu kolekto oni povas vidi la presarton de la antikva Ĉinio. La ĉinaj ideografiaj en ĝi estas bone aranĝitaj kaj gravuritaj per fortaj strekoj. Ili estas honoritaj kiel brila verko de la ĉina antikva kaligrafio.

## KUNLABORO DE ĈINAJ KAJ EKSTERLANDAJ TRADUKISTOJ

La tradukadon kaj kompiladon partoprenis pli ol 200 ĉinaj kaj eksterlandaj tradukistoj kaj eminentaj bonzoj, el kiuj plej

multe kontribuis An Shigao el Irano, Kumarajiva el Hindio kaj la ĉinaj eminentaj bonzoj Xuan Zang (602-664 p. K.) kaj Yi Jing (635-713 p. K.).

Frue en 148 p. K., kiam en Ĉinio ekfloris budhismo, An Shigao venis al Ĉinio por traduki budhismajn sutrojn. Dum sia tuta vivo li tradukis por Ĉinio 39 librojn kaj pro tio li ĝuis grandan reputacion en la ĉinaj budhistaj rondoj.

La tradukoj de Xuan Zang konsistigas konsiderindan parton de la tuta kolekto. Xuan Zang studis budhismon en Hindio 17 jarojn. Reveninte al la patrolando, li okupiĝis pri tradukado de budhismaj sutroj 19 jarojn kaj tradukis 75 librojn kun 1 335 volumoj.

En Sui-dinastio (581-618 p. K.) oni kompilis la kolekton el nekompletaj sutroj kaj poste ĝin pligrandigis. Kaj en 1149 oni reeldonis lignogravure la sutrojn en pli ol 7 000 volumoj kaj konservis ilin en 682 kestoj.

## KAMPARANINO DEROMPIS SIAN BRAKON POR GRA- VURI LA BUDHISMAJN SUTROJN

Oni konstatis, ke tiu, kiu iniciatis la gravuradon, estis kam-


paranino nomata Cui Fazhen. Por montri sian piecon kaj firmen volon gravuri la sutrojn, ŝi senhezite derompis sian brakon kaj per tio alvokis la loĝantojn, ke ili donu monon kaj objektojn por la afero en la daŭro de 30 jaroj.

Kortuŝitaj loĝantoj de Shanxi kaj Shaanxi unuj post aliaj respondis al ŝia alvoko. Bonhavaj familioj gravuris po dekojn da volumoj, dum la malriĉaj oferis siajn arbojn, mulojn aŭ ŝtofojn.

## SEKRETO DUM PLI OL 700 JAROJ

Post la fingravuro kaj presado oni konservis la kolekton en la templo Guangsheng en la gubernio Zhaocheng, Shanxi-provinco. Ĝi kaŝiĝis unue en la Halo de Majtrejo kaj poste en la pagodo "Ĉielarko". Nun en la halo ankoraŭ konserviĝas la ŝrankoj, en kiuj oni entenis la sutrojn siatempe. La pagodo havas 13 etaĝojn kovritajn per sepkolore glazuritaj tegoloj. Sub la suno la pagodo brilas kiel ĉielarko, pro kio ĝi ricevis la nomon. Ĝi estas unu el la plej bone konservataj glazuritaj pagodoj de Ĉinio.

*Bonzo Li Kong*





Post kiam la kolekto estis metita en la pagodon, la guberniestroj de diversaj periodoj tre atentis ĝian protektadon. Kiam nova guberniestro enoficiĝis, la antaŭa unue diris al li, ke li donu al la pagodo anoncon "Estas malpermesite surgrimpi la pagodon". La samon faris ankaŭ la postaj guberniestroj. Kun la tempopaso eĉ la funkcianta guberniestro mem ne sciis, kio estas en la pagodo.

En 1933 bonzo Fan Cheng hazarde renkontiĝis kun maljunulo en Xi'an kaj informiĝis de li pri la sekreto. La bonzo tuj veturis al la templo kaj trovis la kolekton. Tiel la sekreto malkaŝiĝis al la publiko.

### STELISTOJ MALSUKCESIS EN SIA INTENCO

La malkovro de la kolekto tuj vekis grandan atenton de la ĉinaj kaj eksterlandaj budhistaj rondoj. Nemalmultaj intencis posedi ĝin, sed ili senescepte malsukcesis. Printempe de 1942, japanaj invadantoj diris, ke ili transportos la kolekton al sia lando. Aŭdinte tion, bonzo Li Kong de la templo Guangsheng tuj sciigis tion al la kontraŭjapana registaro de la gubernio. La sekretario de la gubernia kompartia komitato Li Xilin, guberniestro Yang Zesheng k. a. senprokraste organizis gerilanojn kaj vilaĝanojn por sekrete transloki en nokto la trezoron sub la preteksto transporti grenon kiel imposton al la japanoj.

### PROTEKTI LA TREZORON PER VIVO

Tiel la kolekto estis transportita el la pagodo. Oni kaŝis ĝin en elĉerpita karbominejo en profunda monto. Foje iu geri-



*Ili diskutas pri riparado de rulaĵoj de "Zhao Cheng Jin Zang".*

lano nomata Liu Yuanzhang iris al la karbominejo por kontroli la konservadon. Lin trafis japanaj soldatoj. Li luktis kontraŭ ili kaj oferis sian vivon.

Estis universitata instruisto Zhang Wenjiao, kiu suferis de ftizo, tamen ofte sekigis la malsekiĝintajn volumojn per milda fajro. Foje survoje du gregoj da lupoj atakis lin. Li faris lukton kontraŭ la bestoj kaj eldangiĝis, sed lia ftizo pligraviĝis de teruro kaj laciĝo. Post kiam li resaniĝis, li ricevis informon, ke li transportu la volumojn al la Pekina Biblioteko en la ĵus liberigita urbo Pekino.

### LA VOLUMOJ BONE RIPARITAJ

Post ekzameno oni trovis, ke iuj el la volumoj putris kaj aliaj grave difektiĝis. Estis malfacile apartigi ilin unu de alia. Post kiam la Pekina Biblioteko ricevis la volumojn, ĝiaj gvidantoj tuj decidis ripari ilin. Ili invitis kvar spertajn riparistojn por tion fari. Ĉi tiuj laboris dek jarojn kaj finis la riparadon en 1964.

La riparitaj volumoj aspektas tiel elegante kaj bonorde, ke oni malfacile povas rimarki, ke ili estis riparitaj.

## Sur la ebenaĵo Xuhuai

de LI PING

### 21. okt. LA ANTIKVA URBO XUZHOU

Xuzhou situanta sur la ebenaĵo Xuhuai estis grava trairejo de akvovojo en la orienta parto de la antikva Ĉinio. Ankaŭ ĝia sorto strikte ligiĝis kun la Granda Kanalo. En Ming-dinastio (1368-1644 p. K.) ĉiujare pli ol 12 000 grentransportaj ŝipoj veturis tra Xuzhou al Pekino. Sed post kiam la Granda Kanalo translokis sian fluejon orienten, komencis velki la urbo. Nur en la komenco de la kuranta jarcento, kiam ekfunkciis la Tianjin-Ŝanhaja kaj Lianyungang-Lanzhou-a Fervojoj, precipe post kiam komenciĝis la plenampleksa ordigo de la Granda Kanalo en 1958, la urbo denove prosperiĝis.

Nun Xuzhou estas la plej granda urbo en la norda parto de Jiangsu-provinco. Ĝin kruce trapasas la supre menciitaj du fervojoj kaj preterfluas la Granda Kanalo. Ĝi estas unu el la gravaj trafikaj centroj en la orienta parto de Ĉinio.

Xuzhou kun historio de pli ol 4 000 jaroj estas unu el la plej fruaj urboj de Ĉinio. De antikveco oni bataladis pro ĝi, tial tie troviĝas multaj historiaj objektoj rilataj al milito. Frue antaŭ 2 000 jaroj la aroganta Xiang Yu, gvidanto de ribelanta armeo, prenis ĝin kiel sian ĉefurbon. Legendo diras, ke Jiuli-monto en la norda antaŭurbo estis loko, kie la fame konata strategiisto Han Xin embuskigis siajn trupojn kaj ektermis la ĉefan forton de Xiang Yu. Eĉ nun ankoraŭ cirkulas la klasika biva komponaĵo "Embuskado", kiu priskribas tiun intensan batalon.

Suprengrimpinte la monton Jiuli, mi vidis, ke fabrikkompleksoj ĉe la montpiedo staras unu apud alia, kaj en la antikva batalkampo nun aperis granda kemiindustria kvartalo.

La karbominejo de Xuzhou sin trovas ĉe la piedo de Jiuli-monto kaj apud la Granda Kanalo.

Oni taksis, ke ĝia rezervokvanto de karbo superis ses miliardojn da tunoj. Ĝi, kiel grava karba bazo de Ĉinio, havas 13 grandajn kaj mezgrandajn ŝaktojn, kiuj ĉiujare produktas pli ol 12 milionojn da tunoj da karbo.

En la dektria jarcento Marko Polo skribis post sia vojaĝo al Ĉinio: "Ĉinoj bruligas nigran ŝtonon." La "nigra ŝtono" estis nenio alia ol karbo. Efektive frue en 1078 Su Shi, fama literaturisto de Song-dinastio kaj subprovincestro de Xuzhou, sendis al la loko ekspluati karbon. Sed la afero ne sukcesis pro senĉesa militado. Nur en la jaro 1882 karbominejo tie oficiale ekfunkciis. Historia libro diras, ke en julio 1077, kiam breĉiĝis la Flava Rivero, Su Shi gvidis soldatojn kaj popolanojn por konstrui longan digon por bari la superakvon. La digon oni nomas poste Digo de Su. Tie ĉiujare okazas incensa kunveno por rememorigi pri tiu prudenta prefekto.

Apud la pitoreskejo Yunlong-monto troviĝas la Muzeo de Xuzhou, en kiu pli ol ducent pecoj da ŝtonaj reliefoj el tomboj de la Orienta Han-dinastio (25-220 p. K.) multe interesis min. La reliefoj kun vivecaj figuroj havas grandan artan kaj arkeologian valorojn. Sur iu ŝtonpeco gravuriĝis ponteto, tra kiu iras grupo da ĉevaloj kaj ĉaroj, kaj sub kiu moviĝas du boatoj fiŝkaptantaj. Estas videble el la bildo, ke tre prosperis siatempe akvovoja trafiko kaj fiŝkaptado.

### 24. okt. VIZITO AL LA HAVENO DE PEIXIAN

Nun en pluva sezono la navigebla parto de la Granda Kanalo longas pli ol 1 100 kilometrojn. La 660-kilometra parto de la kanalo, de Peixian-haveno grava por transporti varojn kaj karbon en la norda parto de Jiangsu ĝis Hangzhou, estas navigebla dum la tuta jaro.



## VOJAĜO LAŬ LA GRANDA KANALO (2)

Kvankam abundas diversaj produktaĵoj sude de Jangzi-rivero, tamen mankas tie energi-fontoj, precipe karbo. Ĉar la fervojo de Pekino ĝis Ŝanhajo estas preskaŭ plene okupita, la transportado de karbo de la nordo al la sudo de Ĉinio dependas de la Granda Kanalo.

La haveno havas historion de pli ol 40 jaroj. Antaŭ la Liberiĝo ĝi estis kajo el natura dekliva bordo kaj la ŝarĝadon kaj malŝarĝadon plenumis malriĉaj kamparanoj el la proksimaj vilaĝoj per manoj kaj ŝultroj. En 1958 oni komencis konstrui la havenon de Peixian, kaj ĝi ekfunkciis en 1960. Nun ĉiujare ĝi povas ŝarĝi kaj malŝarĝi 2.2 milionojn da tunoj da varoj.

Mi vizitis iun laborsekcion de la haveno, kiu kun kvar karbotransportaj kajoj povas ankri kvar 600-tonelajn ŝipojn. Ĉiuj laboroj por karbotransportado estas plenumataj per maŝino. Tamen la nuna stato de la haveno ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de transportado. Nun oni sin preparas por pligrandigi ĝin. Laŭ takso, en 1985 ĝi povos ŝarĝi kaj malŝarĝi kvar milionojn da tunoj da varoj.

### 25. okt. SUR LA ŜIPO

Je la unua horo posttagmeze la pasaĝera ŝipo n-ro 0320, en kiu estas mi, ekveturis de la Haveno de Peixian suden laŭ la kanalo.

Ŝipestro Xu Weibao, simpla kaj modesta viro, afable akceptis min. Li havis pli ol 40

jarojn, el kiuj preskaŭ tridek jarojn li pasigis sur la kanalo.

For de la Haveno de Peixian la kanalo larĝas ĉ. cent metrojn. De tempo al tempo aŭdiĝis sirenado de ŝipoj dum ilia renkontiĝo.


Dek minutojn post la kvara posttagmeze la ŝipo atingis la kluzon Zaohe, kiu servas por reguligi la akvonivelon de la kanalo.

Je duono post la naŭa nokte la ŝipo atingis Suqian-gubernion.

### 27. okt. ŜANĜIĜO DE LA PASEJO DE SUPERAKVO

Suqian-gubernio estis fama pasejo de superakvo. En la pasinteco, kiam okazis torento en Yimeng-montregiono, la loko fariĝis kiel maro. Kaj krome, pro sterileco de grundo la tiea hektara produktokvanto de greno eĉ ne atingis unu tunon. Pri tio oni kulpigis legendan drakoreĝon povantan regi pluvon. Kiam la imperiestro Qianlong (1711-1799) de Qing-dinastio ŝipveturis tien, li konstruigis templon por la drakoreĝo. Sed la drakoreĝo helpis per nenio. Post la Liberiĝo la loĝantoj komprenis, ke nur per siaj propraj manoj ili povas fini sian malfeliĉon. En la pasintaj pli ol 20 jaroj ili konstruis barojn por konservi akvon, fosis pli ol 11 700 kanalojn kun totala longeco de pli ol 13 000 kilometroj kaj funkciigis 232 pumpstaciojn, kio ebligis irigacii pli ol 85% de la kampoj de la gubernio. En la lastaj jaroj senĉese kreskis ĝia grena produkto-

*Ŝipkluzo en Suqian-gubernio*



*La pagodo Jiaotong en Huai'an*



## VOJAĜO LAŬ LA GRANDA KANALO (2)

kvanto. En 1981 la tuta gubernio produktis 400 000 tunojn da greno, je 50 000 tunoj pli multe ol en 1980. Ĝia totala produktokvanto de greno en 1982 jam atingis 475 000 tunojn.

Mi venis al la komunumo Wangguanji 15 kilometrojn for de la guberniurbo. Ĝi jam posedas 20 traktorojn. Antaŭ la aŭtuna semado de la kuranta jaro la komunumo unufoje aĉetis 20 grandajn traktorojn. Kiel ĝi havigis al si tiel multe da mono?

Ĝia respondeculo kun rideto diris al mi, ke en 1980 la komunumo komencis praktiki respondecan laborsistemon, kio multe levis la aktivecon de la kamparanoj. Kompare kun 1979, ĝia totala produktokvanto de greno en 1980 kreskis duoble, tiu de kolzsemoj 17-oble, la produktovaloro de kotono 14-oble kaj pokapa enspezo 4-oble.

Akompanate de li mi vizitis grenkampojn de la sepa produkta taĉmento de Miaowei. En tiu taĉmento ĉiu kamparano havas meznombre dekkvinonon de hektaro da kampo, inkluzive fruktarban ĝardenon. Tial, por pliprodukti, oni devas turni sian atenton al scienca terkulturado. Unue ĝi sendis al aliaj lokoj por lerni sperton kaj la senditoj alportis bonspeciajn semojn. Ili kultivis kotonplantojn en tritikaj kampoj, tiamaniere ili ŝparis kampojn kaj plimultigis produktokvanton de ambaŭ.

Krom terkulturi ili ankaŭ sin okupas pri aliaj produktadoj, kaj ankaŭ tio multe pliigis la enspezon de la komunumo.

En la pasinteco tieaj junuloj eĉ ne havis monon por edziĝo. Ĉi-jare 98 fraŭloj en la komunumo fariĝis novedzoj.

### 28. okt. HUAĪ'AN — LA NORDA FINO DE LA MALNOVA GRANDA KANALO

La plej malnova kanalo komenciĝis de Yangzhou en la norda bordo de Jangzi-rivero kaj finiĝis en Huai'an en la norda parto de Jiangsu.


Ankaŭ Huai'an estas antikva urbo. En historia libro estas noto: Qingliangang-kulturo, la plej primitiva kulturo en la baseno de Huaiherivero, ricevis la nomon ĝuste pro la monto Qingliangang en Huai'an.

En Huai'an estas multaj historiaj objektoj. La pagodo Wentong pli ol 40 metrojn alta en la okcidenta parto de la urbo konstruiĝis en 708 p.K. Starante sur la majesta domo Zhenhuai oni havas panoraman vidon de la urbo. La fama strategiisto Han Xin de Han-dinastio naskiĝis en la urbo. En sia knabeco li perdis siajn gepatrojn kaj vivis vagan vivon en la urbo dum certa tempo. Nun tie estas videblaj liaj postsignoj.

Ankaŭ Wu Cheng'en, la aŭtoro de la ĉina klasika romano "Pilgrimado al la Okcidento" estis Huai'an-ano. Ĉi-jare estas la 400-a datreveno de lia naskiĝo. En 1975 elteriĝis tomboŝtono kun epitafio skribita de Wu por lia patro. Ĝi estas bona materialo por studi Wu Cheng'en.

Huai'an estas la naskiĝloko ankaŭ de la forpasinta ĉefministro Zhou Enlai. Lia malnova loĝejo estas proksime al la domo Zhenhuai. Ĉiutage ĝin vizitas multaj homoj por montri respekton al tiu granda homo.

### MAPO DE LA GRANDA KANALO DE ĈINIO





VOJAĜO LAŬ LA GRANDA KANALO (2)

# NOVA FIZIONOMIO DE LA EBENAĴO XUHUI

Fotoj de REN SHIYIN




Nova industria entrepreno  
apud la kanalo



La multokupita kanalo






Elektrotranssenda turo sur la ebenajo




Riĉa rikolto antaŭvidebla


Paŝtado de anseroj



Pump-stacio sur la kanalo









Karbo-transportaj kajoj en la Haveno de Peixian





Paĝo el "Zhao Cheng Jin Zang"

La pagodo Feihong



## Antikvaj

La Pekina Biblioteko, kiu konservas "Zhao Cheng Jin Zang"







Parto de la antikvaj sutroj

## Sutroj – “Zhao Cheng Jin Zang”

Pri la detalo bv. legi la artikolon “Reviviĝo de Antikvaj Sutroj” en tiu ĉi numero.

Fotoj de WANG JIANMIN

Riparado de rulajo de sutroj

